

1973 decembro

66-a jaro

n-ro 816 (12) kun indekso

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Vojaĝcelo:

Germanujo

en la numero de la jarfina monato, kiu estas ankaŭ tiu de la Zamenhofa naskiĝdato kaj laŭtradicie la monato de la Esperanta libro, pli ampleksan aron da librorecenzoj, kaj, kvazaŭ Novjar-salutajn mesaĝojn el diversaj lokoj, fakoj kaj personoj, sciigojn pri ties varia agado.

Spite al la obstinaj kapoj, kiuj ankoraŭ kuraĝas nei la realecon de la Internacia Lingvo, ĉiam pli da sociaj organismoj turnas sin al la solvo de la lingva problemo, kiun donas Esperanto (p. 204). Pri la ĥaoso, kreata de la manko de komuna lingvo, atestas komunikoj sur la p. 204, 205 kaj 216. Kaj fine sur la p. 206 ni publikigas proponon pri... alia formo de "internacia lingvo".

Enhavo

- 201 Demokrateco kaj memdisciplino en UEA (I. Lapenna)
- 203 Semajno de Internacia Amikeco (Carlén)
- 204 Socialdemokratoj kaj Esperanto
- 204 Lingvaj problemoj en meteorologia centro
- 204 Vigla agado de ĉefaj esperantistoj
- 205 Diskriminacio al la itala en la Eŭropaj Komunaĵoj
- 205 Rekomendo al Brazilaj lernejoj
- 206 La vivo savita (Gabrielli)
- 206 La bildskribo, aŭ for la Internacian Lingvon
- 207 Belartaj konkursoj (E. Lapenna)
- 207 Elstaraj programoj en la kolekto de la magnetofona servo
- 208 Recenzoj
- 210 Laste aperis ... (novaj eldonaĵoj)
- 211 Loke — fake — persone (mallongaj novaĵoj)
- 213 Nekrologoj (Prebil, Görlich, Szirom)
- 213 "Homo kaj Kosmo"
- 213 Memoriga kalendaro
- 214 Hamburgo vokas (59a Universala Kongreso, Hamburgo, FR Germanujo, 1974)
- 215 Komenco bona — ĉio bona
- 216 Oficiala informilo
- 216 Flugo enkotiĝinta en lingvomiskomprenoj
- 217 Anoncetoj
- 218 Indekso

La kovrilo

Tiaj pitoreskaj anguloj, diversstilaj kaj diversepokaj, abundas ĉie tra Germanujo, atestante pri multjarcenta kulturo, kiu restis komuna heredaĵo de ĉiuj germanlingvaj landoj, transpontanta politikajn kaj regionajn diferencojn. Ĉi tiu sceno en anonima urbeto estas nur unu ekzemplo de la kvietaj ripozlokoj, kiujn povus serĉi lacaj kongresanoj en 1974 post la grandurbo Hamburgo. Alia nepre vizitinda estas la mezepoka urbeto Kronach, kiu situas proksimume en la angulo de Bavarujo, Germana Demokratia Respubliko kaj Ĉeĥoslovakujo, norde de Bayreuth. Tie okazos la Oficiala Postkongreso 1974.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Fondita: en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza afriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonc-tarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel en Hardinxveld, Nederlando.

Legantoj en 88 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Mddx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, F.R.Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, F.R.Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.

DEMOKRATECO KAJ MEMDISCIPLINO EN UEA

En la koncepto de demokrateco estas implicitaj almenaŭ du fundamentaj ideoj, el kiuj fontas ĝiaj ceteraj konsistaj elementoj: libereco en esprimado de opinioj kaj regulo de plimulto en farado de decidoj. Ili estas aplikataj en ĉiuj demokrate organizitaj socioj kaj ĉiaspecaj kolektivoj, sed tio neniel signifas, ke la konkretaj aplikoj estas identaj. Ekzistas grandegaj diferencoj kaj koncerne la formojn, en kiuj demokratio funkcias (ekzemple, senpera aŭ reprezenta demokratio) kaj en rilato al la grado de demokrateco (ekzemple, la vasteco de fakta partopreno en la decidado).

Ebleco de komunikado

Kompare kun kiu ajn alia internacia organizaĵo sen neŭtrala komuna lingvo, UEA estas sendube la plej demokrata el vidpunkto de la eblecoj esprimi pensojn kaj interŝanĝi opiniojn en monda amplekso. En la aliaj organizaĵoj, nome en tiuj kun naciaj lingvoj kiel oficialaj aŭ laboraj, la diskutoj estas necese limigitaj pro la lingvaj baroj, tiel ke vastaj partoj de la membraro estas aŭtomate senigitaj de sia demokrata rajto esprimi sin libere kaj senĝene, ĉu skribe ĉu parole, pri kiu ajn demando. Ju pli granda la organizaĵo teritorie kaj nombre, des pli malgranda tiu rajto por la tuta membraro. Interalie, la malebleco komunikadi kaŭzas, ke la decidofara povo restas en la piramida supro kaj neniel kapablas descendi al la pli larĝaj tavoloj de la membraro.

Male, en UEA, pro la foresto de la lingva obstaklo, la membraro ĉiam posedis la necesan instrumenton por esprimiĝi kaj por interŝanĝi opiniojn kun aliaj, eĉ en la plej malproksimaj regionoj de la mondo. La sola eventuala limigo por unuopulo povas esti lia propra nekontentiga lingva nivelo, malhelpanta lin esprimi sin adekvate. Sed pri tio, evidente, ne respondecas la demokrateco, nek kulpas la instrumento, egale akirebla de ĉiuj en relative mallonga tempo.

Tiom, tute principe, pri la demokrataj eblecoj, kiujn prezentas la uzo de la Internacia Lingvo de UEA. Ili ekzistis same tiel en la fondiĝjaro 1908 kaj poste, kiel en 1973. Pro la nombra grandiĝo kaj geografia etendiĝo de UEA, nuntempe ilia valoro estas eĉ pli granda ol antaŭe.

Alia afero estas konstrui tian demokratian maŝinaron, kiu, bazita sur la skizitaj eblecoj de lingva komunikado, maksimume favoros interŝanĝon de ideoj, diskutojn kaj debatojn, decidadon sur ĉiuj niveloj, inkluzive la tutan membraron.

En kio konsistas la demokratiĝo?

La interna demokratigo de la Asocio, konceptita jam en 1947-48 kiel unu el la bazaj taskoj, povis esti realigita nur etapon post etapo, paralele kun la tuta modernigado de UEA, ofte ne sen grandaj rezistoj.

Necesas komenci de la bazo mem: la tuta membraro. Laŭ la Statuto de 1908 UEA konsistis nur el individuaj membroj, kaj ĝiaj celoj estis grandparte limigitaj al praktika utiligo de la lingvo, ĉefe nur por la

membraro. Tio determinis la rajtojn. Kvankam la koncernaj reguloj de la Statuto estis poste iom modifitaj, tamen ankoraŭ en 1933, do senpere antaŭ la t.n. Interkonsento de Kolonjo, nur parto de la membraro povis en kiu ajn senco partopreni en la elektoj kaj en decidado. La tiamajn komitatanojn elektadis nur la delegitoj, vicdelegitoj kaj ĉefdelegitoj de UEA, sed ne la ceteraj membroj. En 1920 la sorton de UEA decidis precize 630 personoj; en 1931 tiu nombro altiĝis al 2 484, t.e. malpli ol triono de la membraro; nuntempe la fina sorto de la Asocio troviĝas en la manoj de la tuta membraro, t.e. precize 33 459 membroj laŭ la stato fine de 1972.

Laŭ la Statuto ellaborita post la Kolonja Interkonsento (1933), la Asocion gvidis la Centra Komitato, kiun elektadis la landaj asocioj (LA), unuflanke, kaj la ĉefdelegitoj kaj delegitoj, aliflanke. Tio estis pli demokrata. Tamen, en la ĝenerala voĉdonado rajtis partopreni nur la "aktivaj", t.e. individuaj membroj, kaj ne la asociaj membroj (AM) aligitaj kolektive pere de la landaj asocioj. La Statuto de Internacia Esperanto-Ligo (IEL) de 1936 konservis la bazan principon por la elekto de la Komitato fare de la LA kaj individuaj membroj pere de la delegitoj, sed ĝi konsiderinde vastigis la rajtojn de la landaj asocioj, precipe en la t.n. ĝenerala voĉdonado. Aliflanke, la individuaj membroj, kiuj troviĝis en landoj sen aliĝintaj LA, ne havis voĉdonan rajton en la ĝenerala voĉdono. La Statuto de 1948, nun same valida tiurilate, korektis tiun situacion kaj donis voĉdonan rajton al ĉiuj individuaj membroj en landoj sen aliĝintaj LA. Plia malgranda precizigo estos necesa antaŭ 1977, kiam, pro juraj kaŭzoj la Statuto devos esti reviziita.


Tiamaniere, laŭ la nuna Statuto de UEA, la tuta membraro partoprenas en ĝenerala voĉdono ĉu rekte, ĉu pere de la aliĝintaj landaj asocioj. La ĝenerala voĉdono devas okazi, se la Komitato aŭ, okaze de urĝeco, la Estraro ĝin decidas; se la aliĝintaj asocioj reprezentantaj kvaronon de la membraro ĝin postulas; se necesas ŝanĝi la Statuton. Oni atendas, ke la LA, antaŭ ol voĉdoni, konsultos sian membraron, por ke la esprimita voĉdono maksimume reflektu la vidpunkton de la membroj.

Ekde 1936 entute okazis 5 ĝeneralaj voĉdonoj: en 1936 por ŝanĝi la sidejon de UEA (sensignifa malplimulto malobservis la decidon de la grandega plimulto, kio poste kaŭzis la disdubiĝon kaj la konatajn procesojn kontraŭ la tiama prezidanto Generalo Bastien); en 1948 por aprobi la kunfandiĝon formulitan en la Statuto de 1948; en 1954-55 du fojojn por ŝanĝi la Statuton kun la celo modernigi la organizan strukturon de UEA; en 1956 por adapti la Statuton al nederlanda juro kaj samtempe por fari en ĝi kelkajn malgrandajn plibonigojn. Kompreneble, ĉiufoje estis aplikataj la reguloj validaj en la momento de voĉdono. La vastigo de demokrataj rajtoj vidiĝas ankaŭ el la reguloj rilatantaj al la elektoj kaj funkcioj de ĉefdelegitoj, delegitoj, fakdelegitoj, vicdelegitoj, komitatanoj kaj aliaj funkciuloj de la Asocio.

Precipe grava estas la elekto de la Komitato. La fakto,

Demokrateco kaj memdisciplino

ke UEA nun konsistas el organizaĵoj (kolektiva principo) kaj unuopuloj (individa principo) reflektiĝas en la konsisto de la Komitato kaj en la demokrata sistemo, laŭ kiu ĝi estas elektata. En la Komitato troviĝas komitatanoj A, elektataj de la aliĝintaj asocioj; komitatanoj B, elektataj de la ĉefdelegitoj kaj delegitoj; kaj komitatanoj C, alelektataj de la komitatanoj A kaj B kun la celo certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj en diversaj branĉoj de aktivado.



Grava elemento en la demokrateco de UEA estas la ĉeno de respondecoj: la geoficistoj de la C.O., nomataj de la direktoro kun aprobo de la Estraro, respondecas al la direktoro; la direktoro, nomata de la Estraro, respondecas al la Estraro; same la redaktoro kaj diversaj komisiitoj, se nomitaj de la Estraro; la Estraro, elektata ĉiun trian jaron de la Komitato, respondecas al la lasta; la Komitato, same tiel elektata ĉiun trian jaron, respondecas al la elektorganoj; tiuj lastaj, same kiel ĉiuj aliaj organoj kaj instancoj de UEA, al la tuta membraro tra la ĝenerala voĉdono, kiu povas nuligi ĉiujn decidojn kaj elektojn, aŭ esprimi sin pri ĉiuj aĵoj demandoj submetitaj de la Komitato aŭ, en kazo de urĝeco, de la Estraro.

Paralele kun la demokratigo de la elektosistemo kaj decidpovaj rajtoj evoluis la konscia vastigado de la diskutoblecoj kaj publika kontrolo. Unuavice tio

rilatas al la ĝeneralaj kunvenoj de la universalaj kongresoj, kaj al ĉiuj aliaj tutkongresaj kunvenoj, ekzemple sekcioj, organizataj de tempo al tempo. Dum tiaj kunvenoj ĉiu membro de la Asocio — kaj ankaŭ ĉiu alia kongresano — povas libere esprimi sian opinion, kritiki, fari demandojn kun la rajto ricevi respondojn. Alia kadro, konscie kreita por pritrakti aktualajn demandojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado, estas la t.n. debatoj, enkondukitaj en 1969. Ekde tiam ili fariĝis grava ero en la kongresaj programoj.

Por ebligi vastan kontrolon la kunsidoj de la Komitato, laŭ la propono de la subskribinto, fariĝis publikaj en 1955. La publikeco de la kunsidoj estas faktoro de publika kontrolo kaj, kiel tia, plia elemento de demokrateco. En januaro 1973, denove laŭ la propono de la subskribinto, la Estraro nuligis la konfidencon de siaj protokoloj kaj aliaj dokumentoj, kun la escepto de demandoj eksplicite deklaritaj konfidencaj kun difinita periodo.

Aliajn elementojn de demokrateco prezentas la kunvenoj de delegitoj, de reprezentantoj de informaj fakoj kaj similaj aranĝoj, organizitaj ĉu regule, ĉu sporade, depende de la konstanteco aŭ provizora aktualeco de la traktota demando.

La menciitaj konscie kreitaj novaj kadroj certe kontribuis al pli bona kono de faktoj kaj al formiĝo de komunaj vidpunktoj. Alia afero estas, ke ankaŭ tiuj demokrataj institucioj ne estas plene utiligitaj. Ankaŭ pri tio ne kulpas la demokrateco de UEA, kiel kelkaj ignorantoj de faktoj plurfoje klopodis kredigi, sed verŝajne nesufiĉa interesiĝo kaj inerteco.

Memdisciplino kiel komplemento de demokrateco

Por la glata funkciado de la menciitaj kaj de aliaj demokrataj institucioj, kaj sekve por la prosperado de UEA, multe pli gravas la libervole akceptita memdisciplino, ol ĉiuj aĵoj formalaj garantioj de la Statuto kaj reguloj celantaj sinprotektion de la Asocio kontraŭ eraroj kaj mispaŝoj. Nenio povas helpi, se forestas bonvolo kaj sincera deziro agi konkorde por realigi la celojn konforme al la Statuto kaj la aliaj bazaj organizaj dokumentoj de UEA. Alivorte, sen memdisciplino kiel esenca komplemento de demokrateco, neniu demokrata organizaĵo povas ekzisti. Pri tio plurfoje atentigis jam Zamenhof. Ekzemple, en sia fama adiaŭa parolado dum la 8a UK (1912) li diris preskaŭ testamente: "Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cede de la malplimulto al la plimulto".

Hector Hodler, la fondinto de UEA, same tiel plurfoje admonis pri la neceso de interna disciplino, kiu, finfine, estas nenio alia ol respekto de libervole akceptitaj respondecoj kaj devoj (Art. 9 de la Statuto) kiel kontraŭpezo por la rajtoj sur la pesilo de demokrateco.

Malgraŭ tiu pli ol evidenta vero, la memdisciplino estis kaj verŝajne plu estos misprezentata ĝis nerekonno. Oni ne hezitis aperte identigi ĝin kun ia armea, serĝenta-kaporalaj disciplino, kvazaŭ Zamenhof, aŭ

kiu ajn alia pledanto por memdisciplino, estus kiam ajn favorinta ian "armean" disciplinon en UEA, kaj kvazaŭ ĝi entute estus ebla en kultura libervola organizaĵo, eĉ se iu fakte venus al la freneza ideo deziri ĝin. Troviĝis eĉ unuopuloj kaj grupetoj (kutime personoj mem malkapablaj partopreni en kia ajn komuna laboro), kiuj aŭdacis misfamigi tiun konsistan elementon de demokrateco, ligante ĝin al abomene antipatiaj esprimoj kiel "diktatoreco", "kulto de personeco" kaj similaj absurdaĵoj, ĉio kun la celo semi malkonkordon kaj malfidon. Ĝuste tial necesis reveni al la afero de tempo al tempo por precizigi la sencon de memdisciplino kaj por doni al la tuta demando de demokrateco en UEA la ĝustan proporcion.

Oni neniam forgesu, ke demokrateco tutsimple ne povas vivi sen minimuma socia disciplino. Foresto de elementa disciplino en internaciaj rilatoj kondukas al anarkio, terorismo kaj agreso. En politikaj demokratioj malobservo de socia disciplino fine kondukas al detruo de demokrataj institucioj kaj al establo de totaleca diktaturo. Kutime, tiujn sekvojn

nek antaŭvidas, nek deziras la sendisciplinaj minoritatoj, kvankam ili povus lerni el la eventoplena moderna historio, en kiu abundas ekzemploj kun tiaj tragikaj sekvoj. Eĉ la plej demokrataj konstituciaj garantioj kaj leĝaj preskriboj ne povas malhelpi la procezon de malintegriĝo kaj la finan pereon de demokratio. En sociaj-kulturaj organizaĵoj foresto de memdisciplino kaŭzas formortadon kaj malaperon.

En UEA, ĝuste pro ĝia alta grado de demokrateco en kondiĉoj de granda heterogeneco de la membraro, malobservo de almenaŭ minimuma memdisciplino kaj de la implicita lojaleco certe kondukus en la abismon de disfalo, se la malbono ne estus ĝustatempe haltigita. Feliĉe por UEA kaj por ĝia estonteco, la komuna prudento, almenaŭ ĝis nun, ĉiam fine venkis: la demokratiaj institucioj de la Asocio, inkluzive racian memdisciplinon, sukcesis superregi en la decidaj momentoj la ekscesojn de sendisciplinaj malobservoj de demokrateco.

Ivo Lapenna

Semajno de Internacia Amikeco

18-24 februaro 1974



Semajno de Internacia Amikeco (SIA), kvankam lanĉita nur antaŭ kvin jaroj, jam fariĝis tradicia inter ni. Tamen, ankaŭ aliaj, ekster nia Movado, aliĝis al la celebrado de la Semajno: la usona ŝtato Illinois kaj la urboj Portland, Sanfrancisko, St. Petersburg, Tampa kaj Ĉikago oficiale proklamis la celebradon de SIA. Krome, en pluraj aliaj landoj (Hispanujo, Belgujo, Britujo, Hungarujo, Aŭstrujo) ĉi-jaraj aranĝoj en la kadro de la Semajno ne havis pure esperantistan karakteron, sed vekis interesiĝon de la vasta publiko.

Verŝajne ne montriĝos superflue se ni denove revenos al la demando: Kiaj celoj instigis la siatempnan iniciaton kaj lanĉon de la Semajno?

Kelkfoje oni komparis la esperantistojn kun popolo nacia, kaj, se la komparo almenaŭ parte estas ĝusta, tiam ankaŭ ni havas komunajn lingvon, kulturon kaj historion. Tio certe kreas senton de solidareco kaj unueco inter ni kaj povas esti nur utila por la Movado. Por plifortigi tiun solidarecon ni, same kiel nacia popolo, bezonas komunajn tradiciojn. Kvankam ni jam delonge havas tiajn, ekz. la Universalaj Kongresoj, en kiuj diversmaniere aperas vera internacia kulturo, certe ankaŭ SIA fariĝas tradicio valora por ni. Kompreneble, ke ni ne volas krei ian naciismon aŭ ŝovinismon en popolo vere internacia, ĉar tio ja per si mem estus neebla kaj absurda.

Unu el la celoj de SIA estas krei belan tradicion, kiu nin unuigas kaj en praktika, konkreta maniero prezentas la bazan ideon de Esperanto: amikeco trans limoj, naciaj, rasaj, politikaj kaj religiaj. Ni ne volas forigi ĉiujn limojn, sed jes ni volas renkonti geamik-

ojn ĉe la alia flanko de la limo.

Sed SIA havas ankaŭ alian celon, praktikan. Ĝi estas atentigo pri la Internacia Lingvo kaj ĝia movado, direktita al pli vasta publiko. Mi rimarkis, ke la ideo pri la amikeco trans limoj plaĉas al la homoj, se oni ĝin bone prezentas al ili. Tio donas ekz. al niaj kluboj kaj lokaj societoj okazon aranĝi kunvenon kun invito al neesperantistoj. Se oni bone antaŭpreparas, la urbo aŭ komunumo ofte pretas doni subvencion. En la programo povas esti parolado de urbestro aŭ alia eminentulo, muziko aŭ kantado, kafo aŭ teo, mallonga parolado pri problemoj, kiujn naskas la manko de komuna lingvo aŭ pri la Internacia Lingvo mem. Jam la anoncado de tia festo estas utila por atentigi pri Esperanto. Tamen ne forgesu en tiaj okazoj inviti ĵurnalistojn de la lokaj gazetoj.

Dum la Semajno ĉiu esperantisto faru ion por internacia amikeco, eĉ se temus nur pri sendado de salutkartoj aŭ donacetoj al eksterlandaj amikoj. Alia ideo povus esti jena: UEA havas specialan fondaĵon kun la celo membrigi esperantistojn en landoj kun transpagaj malfacilaĵoj. Se vi vivas en lando, kie tiaj malfacilaĵoj ne ekzistas, sendu malgrandan (aŭ grandan) mondonacon al la tiucela Fondaĵo Canuto. Tio estus inda gesto de amikeco trans limoj.

Ni petas vin: poste skribu mallongan raporton pri la aranĝoj de la Semajno en via loko, kaj sendu ĝin ne nur al la loka gazetaro, sed ankaŭ al via Landa Asocio kaj C.O. de UEA.

Erik Carlén
Komisiito pri Semajno
de Internacia Amikeco

Socialdemokratoj kaj Esperanto

Ni jam komunikis pri la interesiĝo al la problemoj de la Internacia Lingvo flanke de la itala socialdemokrata partio, unu el la registaraj partioj.

La 28an de majo 1973, la sekretario de la internacia oficejo de la itala socialdemokrata partio, Vladimiro Mihelj, sendis leteron al ĉiuj socialismaj partioj aliĝintaj al la Internacio. Ĝis nun la itala socialdemokrata partio korespondis internacie en la franca lingvo. Ĉifoje la letero estis sendita nur en la itala (do, en la nacia lingvo) kaj en Esperanto, tiel metante en praktikon la principajn asertojn de la letero mem, kiun ni publikigas ĉi-sube:

*Al ĉiuj socialismaj partioj
aliĝintaj al la Internacio*

Temo: Esperanto.

Problemo tre grava je internacia nivelo, kiu, ĝis nun, strange neniam estis alfrontita en la sino de la Socialisma Internacio, estas tiu de adopto de komuna helpa lingvo por la socialismaj partioj kaj la mondo de l'laboro.

Unuiga lingvo por la popol-amasoj ŝajnas, ja, necesa por konkrete realigi la socialismajn principojn pri frateco, solidareco kaj internacia organizo.

Por eviti maljustajn diskriminaciojn (je daŭra av-

antaĝo de la favorata popolo kaj je daŭra malavantaĝo de ĉiuj aliaj), ni opinias, ke tiu helpa lingvo povas esti neniue el la ekzistantaj naciaj lingvoj: tial, nia partio iniciatis proponon al la Socialisma Internacio, por adopto de la lingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj.

La Ĝenerala Sekretario Hans Janitschek komunikis, ke li submetos tiun temon al la ekzameno kaj pridiskuto de la Buroo de Internacio en unu el la venontaj kunvenoj.

Nia Partio jam prezentis al la itala Parlamento leĝproponon por enkonduko de la instruado de Esperanto en la italajn lernejojn: ni proponas, do, ke ankaŭ aliaj socialismaj partioj prezentu similajn proponojn al la koncernaj Parlamentoj.

Ni, opinias, ke kunordigo de la iniciatoj estas esenca, aparte inter la socialismaj Partioj de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo: la adopto de komuna supernacia lingvo favorus, ja, la naskiĝon de eŭropa konscio ĉe la Eŭropaj popoloj, kiu certe estus utila cele al politika unuiĝo.

Ni ŝatus koni vian opinion koncerne la menciitan temon.

Vladimiro Mihelj

Lingvaj problemoj en meteorologia centro

La subskribo de la estonta konvencio pri la starigo de la Eŭropa Centro por mezlongaj prognozoj meteorologiaj (European Center for Medium Range Weather Forecasts — Centre européen pour les prévisions météorologiques à moyen terme; estonta sidejo: Shinfield Park, Reading, Britujo) ne povis okazi en julio 1973 kiel antaŭvidite pro la problemoj pri oficialaj kaj laboraj lingvoj de la centro. Laŭ la proponita solvo la angla, franca, germana, itala kaj nederlanda estu la oficialaj lingvoj, sed nur la angla, franca kaj germana la laboraj lingvoj; sed, ĉar Nederlando ne deziris akcepti la distingon inter oficialaj kaj laboraj lingvoj, oni estis devigitaj prokrasti la subskribon, ĝis alia solvo estos trovita aŭ Nederlando ŝanĝos sian starpunkton.

La sekvantaj 18 ŝtatoj subtenos la centron: La 9 membroj de EK, plus Aŭstrujo, Finnlando, Greklando, Hispanujo, Jugoslavio, Portugalujo, Svedujo, Svislando kaj Turkujo.

Vigla aktivado de ĉefaj esperantistoj

Jam tradicia Somera E-Lernejo en Dudince kunvenigis 154 partoprenantojn. Ĝia daŭrigo ĉi-jare estis 7-taga E-Festivalo en Banská Bystrica, kiun ĉeestis 160 personoj. La tradicia aŭtuna Amika Esperantista Renkontiĝo en Dudince allogis 180 partoprenantojn. Ĉiujn ĉi aranĝojn, krom ĉefaj esperantistoj, partoprenis ankaŭ eksterlandaj gastoj. La partopreno de 50-membra folkloro ensemblo el Bulgarujo en la E-Festivalo altiris la atenton de ŝtataj instancoj, dank' al kio por la venonta jaro la Regiona Kultura Centro jam enplanis tiun E-manifestacion en sian programon. En la komenco de februaro la ĉefaj esperantistoj organizas denove E-skisemajnon sur la monto Sitno (1011 m). Tia vigla aktiveco de la ĉefaj esperantistoj estas subteninda per aktiva partopreno de esperantistoj el aliaj landoj. Por informoj skribu al: Ernesto Váňa, Dudince okr. Zvolen, Slovakio, ĈSSR.

Diskriminacio al la itala en la Eŭropaj Komunaĵoj

El *“Europa van Morgen”*.

La Komisiono de la Eŭropaj Komunaĵoj respondis demandojn de s-ro Girardin (itala kristan-demokrato).

DEMANDO 1): Ĉu la Komisiono estas informita, ke, ĉe la Eŭropaj Komunaĵoj kaj la instancoj uzantaj la lingvoservon de la Komisiono, la bazaj dokumentoj estas disponigataj kaj la diskutoj de la laborgrupoj okazas [nur] france, germane kaj angle?

RESPONDO: Pro la tre multaj laborgrupoj ekzistantaj en la kadro de la Komisiono, praktike ne eblas tradukigi ĉiun labordokumenton en la ses lingvojn de la Komunaĵo. La Komisiono tamen klopodas prepari tradukojn en la lingvoj, kiuj estas efektive uzataj de la ekspertoj partoprenantaj en la laboroj de la koncernaj grupoj, interkonsiliĝe kun la prezidantoj de la laborgrupoj. Poste ĝi klopodas en kiel eble plej mallonga tempo tradukigi la dokumentojn en ĉiujn lingvojn, kiam ĉi tiuj dokumentoj atingis la stacion konsidereblan kiel relative definitivan.

DEMANDO 2): Ĉu la Komisiono povas komuniki, sur kiuj gvidlinioj aŭ indikoj ĉi tiu praktiko baziĝas aŭ kiel ili estas kreitaj?

RESPONDO: La Komisiono konfirmas, ke la priskribita praktiko ne baziĝas sur iuj ajn gvidlinioj, sed ke ĝi evoluis tute nature laŭ pragmata maniero.

DEMANDO 3): Ĉu la Komisiono opinias akceptebla, ke, dum la malfacila fazo de la projektado de ag-principoj profunde influantaj la ekonomian kaj socian vivon de la ŝtatoj-membroj, tiuj, kies tasko estas prijuĝi iliajn gravecon kaj sekvojn, ne povas uzi la plej naturan komunikilon, nome la propran lingvon?

RESPONDO: La Komisiono klare vidas, kiel gravas por la ekspertoj labori per tekstoj redaktitaj en ilia lingvo. Ĝi ĝis-maksimume klopodas aperigi en la ses lingvoj ĉiujn dokumentojn, kiuj, ĉu pro la enhavo,

aŭ pro la teknika karaktero, devas esti tradukitaj tuj ĉe la posta sesio.

DEMANDO 4): Ĉu la Komisiono povas sciigi, kion ĝi, konsiderante la neceson baldaŭ ĉesigi tian diskriminacian situacion, intencas fari, kaj ĉu ĝi povas certigi, ke en la kadro de la Eŭropaj Komunaĵoj la interpretado el kaj en la italan, kaj simile la ĝustatempa tradukado de bazaj dokumentoj en la italan estu ree observata?

RESPONDO: Por povi alfronti ĉi tiujn problemojn, ni petis de la Konsilo, kaj por la buĝeto de 1973 kaj por tiu de 1974, grandan nombron da sumoj en la kategorio LA (interpretistoj kaj tradukistoj). Tre baldaŭa asigno por la sumoj de la buĝeto de 1974 estas antaŭvidata. En la venontaj monatoj la situacio do grave pliboniĝos. Aliflanke, du ĝeneralaj komparaj ekzamenoj por interpretistoj kaj help-interpretistoj nun okazas. Krome la Komisiono ekde 1973-01-01 enoficigis dek italajn interpretistojn kiel helpajn funkciulojn.

Aldone la Komisiono antaŭ nelonge decidis plivastigi siajn klopodojn varbi italajn interpretistojn kaj ankoraŭ pli ol antaŭe inviti itallingvajn porokazajn interpretistojn.

Krom ĉi tiuj rimedoj la Komisiono organizas, kadre de sia kursa programo, kursojn por rapidinstruado al lernantoj-interpretistoj por junaj universitataj diplomitoj pri aliaj fakoj, kio donis jam tre bonajn rezultojn.

Speciale koncerne la traduk-problemojn, la Komisiono ŝatas sciigi al la estimata Parlamentano — por doni ideon pri la vera situacio — ke la servoj establita en Bruselo dum la unuaj kvar monatoj de 1973 tradukis monate po 5 500 paĝoj en la italan.

Rekomendo al Brazilaj lernejoj

En julio ĉi-jare, dum la 8a Seminario de Esperanto en la urbo Marília (São Paulo), estis lanĉita la libro *D-ro Esperanto* de prof. Walter Francini. La bona lingvaĵo de la libro kaj ĝia, por la babela mondo, aktuala enhavo tuj vekis atenton de la publiko: la libro bone vendiĝas. Eĉ pli, ĝi ricevis apartan rekomendon de la provinca eduka instanco en la *“Oficiala Gazeto”* de la provinco São Paulo:

“La libro estas rekomendita de la Teknika Komitato por Libro kaj Instru-materialo de la Sekretariejo por Edukado de la provinco São Paulo por diskonigo en la duagrada kaj porinstruistaj lernejoj”. (Dosiero 0412-73, Diário Oficial de 14-09-73).

La 9an de oktobro '73, asembleano de la sama provinco, s-ro J. Maltoni, direktis al la provinca registaro la dosieron kun studoj, motivantaj akcepton de Esperanto en la studprogramojn de la duagrada kaj superaj lernejoj de la provinco.

La iniciato havas precedencojn en Brazilo, kie la leĝoprojektoj de pluraj provincoj permesas la instruadon de la Internacia Lingvo en mezaj kaj superaj lernejoj ĉu devige, ĉu kiel elektebla studobjekto. Tiel, la Universitato de Ceará-provinco okazigas kursojn de la Internacia Lingvo jam de pluraj jaroj. Pli frue, en Brazilo estis entreprenita provo por enkonduki la instruadon de Esperanto landskale, kiu cele al la landaj aŭtoritatoj estis prezentita peticio, pledanta por la instruado de la lingvo en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj. Responde al tiu peticio la Federacia Konsilantaro por Edukado komunikis en la 1a de oktobro 1968, ke, konforme al la validaj landaj leĝoj kaj konsiderante la malsamajn kondiĉojn en la diversaj regionoj de la lando, la Konsilantaro, rekonante certan valoron de la instruado de Esperanto, permesas ĝian enkondukon en mezgradaj lernejoj sen deviga karaktero de la rekomendo.



Lina Gabrielli, plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, estas konata ne nur kiel poetino. Tre popularaj estas ankaŭ ŝiaj prozaĵoj en Esperanto, el kiuj laste aperis la rakonto "Karnavalo". L. Gabrielli doktoriĝis en ekonomio kaj komerco kaj poste studis ankaŭ la politikan ekonomion. Kiel membro de ĵurnalista unuiĝo ŝi publikigas siajn verkojn en diversaj ĵurnaloj kaj revuoj de Italujo. En 1965 ŝi aperigis itallingvan romanon el vivo de esperantistino "Un cuore caldo" ("Varma koro").

La vivo savita

LINA GABRIELLI (Italujo)

*Jonathan,
plenumis
mi la promeson
faritan al vi.
Vi nun estas mia,
nur mia
vi estu nun!
Tio signifas
ke mi disponas
pri via vivo,
ke vivi vi povas.
Hieraŭ vespere
mi estis ploranta
pro vundo
de mia koro
kiam mi trairis
la vojeton
apud la doma
pinarbo kaj
renkontis vin.
Vi remaĉis la herbon
kun mieno trankvila
kio konsolis min
kaj mirigis.
Kvankam la ploro
rosis
en mia koro
kaj brilis
en miaj okuloj,*

*mi diris al vi:
"Jonathan,
la vivo
estas bela".
Via trankvilo
kortuŝis min,
ĉar vundojn
de la koro
vi ne konas,
Jonathan,
eĉ vi ne scias
ke ekzistas morto,
ke morto
minacas vin.
Vi kvierte remaĉas,
vi kreskas,
vi iĝas dika,
por ke la homo
profitu de vi.
En aŭtuno vi devos
morti,
Jonathan,
se oni ne savos vin.
Vundoj de la koro
saniĝas,
sed vivon,
vian vivon,
kiu redonus al vi?
Jen, Jonathan,*

*ĉar mi aĉetis vin!
Ĉimatene,
vidante vin
en la kampo,
mi anoncis
al vi:
"Jonathan,
mia dolĉa,
mia blanka ŝafido,
plenumis mi
la promeson,
savita estas vi! "
Vi ne levis
la kapon,
vi ne atentis min.
Mi frostis iomete
pro manko
de suno,
sed varmaj sentoj
kaptis mian koron
kaj mi diris
al mi mem:
"Mi savis
ĝian vivon kaj ĝi
eĉ ne scias".*

Alvdal (Norvegujo), 24.9.73

La bildskribo, aŭ for la Internacian Lingvon !

Direktoro de granda mebloentrepreno rakontas al siaj amikoj impresojn pri ekskurso al Italujo.

— Karaj — li rakontas — la italoj estas tiel inteligentaj kaj gastamaj, ke ili fulmrapide divenas ĉiun deziron de turistoj. Por ligi kontakton kun ili, superflua estas kono de la itala, sufiĉas nia gepatra lingvo! Aŭdu, kio okazis al mi en la eta Portofino, kie oni pasigas tempon ĉe la bordo de la maro, aŭ en ia drinkejeto ĉe kafo aŭ vino.

Dum kelktagojn daŭra pluva vetero tedis min observado de preterpasantoj tra la fenestrego; mi estis kole-
ra kaj enuiĝinta. Do kun ĝojo mi salutis belan, junan italanon, kiun bona sorto direktis al mia tableto. Rideto plenumis la rolon de la reciproka sinprezento. Mi demandis, ĉu mi povas mendi ĉe kelnero ion por ŝi. La knabino atente aŭskultis, ekrigardis min kaj movis la ŝultron. Mi do montris per fingro la glaci-
aĵon, starantan antaŭ ŝi, kaj ripetis la proponon. Ĉi-foje mi estis komprenita, kapklino signifis konten-

ton. Mia ĉarma najbarino intertempe prenis el la mansaketo notlibron, krajonon kaj sur karteto desegnis montojn, arbarojn, verŝajne demandante tia-
maniere pri mia devenlando.

La tempo pasis, vesperiĝis. Ree mi ekuzis la bild-
skribon, kaj, dezirante proponi al la italino la komu-
nan pasigon de la vespero, antaŭ ĉio mi desegnis
tablon, ian botelon, kokidon, sur alia karteto violon-
iston, pianon, dancantan paron. La knabino atente
rigardis la bildetojn. Mi ekspiris libere... — mia
propono estis ĝuste komprenita kaj ĝoje aprobita.
Ni interkompreniĝis ĉiam pli bone. Imagu do mian
miron, kiam la italino subŝovis al mi karteton kun
desegno de lito.

Mi ĵuras, ke dum la tuta interparolo eĉ ne per unu
vorto mi menciis al ŝi, ke mi laboras en la meblo-
industrio. Ĝis nun mi ne povas kompreni, kiel ŝi
tion divenis.

Esperantigis Isaj Dratwer

BELARTAJ KONKURSOJ

Per ĉi tiu artikolo el la plumo de la nuntempa sekretariino de la Belartaj Konkursoj de UEA ni daŭrigas la antaŭ-publikigon de elektitaj eroj el la preparata *Enciklopedio de Esperanto*.

Por progresigo de Esperanta literaturo originala kaj tradukita, UEA fondis beletran konkurson sub la nomo BELARTA KONKURSO. En la nuna formo ĝi ekzistas ekde la jaro 1950. Dum la Universala Kongreso en Parizo la unuan fojon en la kadro de la kongresa programo estis solene proklamitaj la aŭtoroj de la premiitaj verkoj.

Inter la jaroj 1950 kaj 1954 BK funkciis laŭ provizora programo. La komitato de UEA trifoje (jaroj: 1955, 1959 kaj 1965) akceptis regularon pri BK. Laŭ la regularo konkursi povas ĉiu kongres-aliginto kaj ĉiu alia membro de UEA, sed partopreno al la Konkurso ĉiam estis neformale traktita. Konkursaĵo devas esti verko antaŭe ne publikigita.

Ĝis nun la sekretarioj de la Konkurso estis s-ro R. Rossetti (1950-55), d-ro F. Szilágyi (1956-57), s-roj G. Jervis (1958-60), W. Auld (1961-62), E.P. Ockey (1963-64) kaj s-ino E. Lapenna (1965-). Laŭ la regularoj 1955 kaj 1959, la sekretario estis ankaŭ membro de la juĝkomisiono kaj la konkursan materialon akceptadis peranto. Laŭ la regularo 1965, la sekretario gvidas la tutan konkursan laboron, sed ne prijuĝas la konkursaĵojn; tion faras internacia juĝkomisiono, konsistanta el 3 membroj por la poezia kaj 3 membroj por la proza branĉo de la Konkurso. En 1970 la juĝkomisionanoj estis ges-roj: Clelia Conterno Guglielminetti (Italujo), W. Auld (Skotlando) kaj I. Rotkviĉ (Jugoslavio) por poezio kaj R. Bernard (Francujo), J.H. Rosbach (Norvegujo) kaj A. Venture (Britujo) por prozo. La prezidanto de la juĝkomisiono estas prof. G. Waringhien (Francujo). La konkursaj branĉoj laŭ ĉiuj tri regularoj estis: originala kaj tradukita poezio, prozo kaj dramo.

Tamen okazis plivastigoj: en 1954 konkurso por originala romano kaj en kelkaj jaroj "kongreslanda branĉo", sed ankaŭ redukto okazas — en lastaj jaroj tradukitaj prozo kaj dramo ne eniris la Konkurson.

En ĉiu anoncita konkursa branĉo ekzistas 3 premioj ligitaj al mona donaco, kaj "Laŭda mencio" kiel aldona distingo. Proklamo okazas solene dum aparta aranĝo en la kadro de la Universalaj Kongresoj, kun laŭtleĝado de premiitaj verkoj. Ekde 1960 al la premioj estas aldonita aparta "Nova talento" por konkursantoj neniam premiitaj, sed atingintaj bonan rezulton ne sufiĉan por akiro de la premio. S-ino G. Harabagiu el Usono en la jaro 1966 donacis "Pokalon Harabagiu", sur kiu estas gravuritaj la nomoj de ĉiuj venkintoj en tiu premio-kategorio.

Konkursajĵoj alvenas por unuopa jara Konkurso en kvanto inter 40 kaj 125 pecoj de 20 ĝis 45 aŭtoroj el multaj landoj. 95 aŭtoroj ricevis agnoskon en BK de 1950 ĝis 1970. Pluraj nun konataj verkistoj estis premiitoj en Belarta Konkurso (Boulton, Urbanová, Auld, Francis, Knoedt, de Kock, Kořínek, Rossetti, Mattos). La plej multajn premiojn ĝis nun ricevis M. Boulton — 21 (inter la jaroj 1950 kaj 1962).

En la poezia branĉo estis aljuĝitaj la plej multaj premioj, en la drama la plej malmultaj. En la jaroj 1966, '67 kaj '68 por originala dramo estis aljuĝita eĉ ne unu premio.

Laŭ ebleco la premiitaj konkursaĵoj aperas presitaj en la publikaĵoj de UEA, sed pro manko de spaco, laŭ interkonsento kun UEA, premiitaj (ankaŭ nepremiitaj) verkoj aperas ankaŭ en aliaj revuoj.

Emilija Lapenna

Elstaraj programoj en la kolekto de la magnetofona servo

La kolekto de la Magnetofona Servo de UEA nun enhavas jam 348 diversajn programojn, kiuj estas anoncitaj en nova listo havebla kontraŭ respond-kupono de la Centra Oficejo aŭ rekte de la Magnetofona Servo, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ontario, L5H 3N6, Kanado.

Inter la elstaraj programoj mi *ne* volas mencii ĉi tie kongresajn prelegojn — la nomo kaj reputacio de la preleginto kaj la temo indikas kutime, kion vi povas atendi de la programo — aŭ surbendigojn de kongresaj aranĝoj, ĉar ĉiu, kiu iam partoprenis kongreson, povas imagi, kion li aŭdos. Kaj kiu neniam povis ĉeesti, nepre mendu kelkajn programojn, por almenaŭ orele partopreni tian manifestacion. Por faciligi la elekton inter la aliaj programoj, mi priskribas en ĉi tiu nova serio kelkajn, kiuj ŝajnas al mi speciale menciindaj pro iu aŭ alia kaŭzo, por ke ili ne perdiĝu inter la amaso de la listigitaj programoj:

58-60: 'La unua amo', 'La malbone edukita papago', 'La fantomo'. Ĉi tiuj tri humuraĵoj, kiujn elsendis Radio Zagreb, apartenas al la plej ofte kopiitaj programoj de la MS. Ili ne pretendas esti literature altnivelaj, sed celas distri la aŭdantojn. Dank' al vigla prezento la humuraĵoj plenumas tiun celon. Daŭrante nur 15 aŭ 20 minutojn, ili taŭgas por aŭdigo dum kunveno de loka grupo.

136: Pola Radio: 6 literaturaj programoj. Duhora programaro, kiu elstaras pro profesiismo kaj literatura valoro. La plej multajn programojn en la kolekto de la MS preparis amatoroj; ĉi tiun preparis aro da radio-parolistoj utiligantaj la teknikajn rimedojn de radiostacio. Se ili prezentas radio-dramon, la atingita nivelo kompreneble estas pli alta. Elstaraj ŝajnas al mi la legaĵoj el la 'Infana Raso' (Auld), la programo 'Poezio de afrikaj popoloj' kaj la amuza 'Song'o de kursgvidanto' (Boulton).



140: 'La voĉo de Zamenhof'. En 1909, okaze de la 5-a UK en Barcelono, d-ro Zamenhof gravurigis sian voĉon sur malnovan vakscilindron, deklamante "La Espero", saluton kaj dankparoladeton. Uzante ĉi tiun registraĵon Kataluna Esperantista Asocio preparis en 1930 sondiskon, de kiu la Magnetofona Servo ricevis sonbendan kopion. Kvankam la teknika kvalito de la registro laŭ la nuntempaj postuloj estas ege malbona, oni tamen — post ofta reaŭdado de la bendo — povas mense forigi la bruojn de la vaksa cilindro kaj de la disko, kaj oni tiam povas klare aŭdi la junecan voĉon de Zamenhof kaj lian prononcmanneron. Ĉi tiu programo estas la plej valora sondokumento en la kolekto de la MS, ĉar laŭ mia scio ĝi estas la sola ankoraŭ nun ekzistanta registraĵo de la voĉo de d-ro Zamenhof, vera trezoro por ĉiu, kiu okupiĝas pri la fonologio de nia lingvo.

200: 'La Marvirineto' de H.C. Andersen. Por ke ankaŭ komencantoj havu programon, kiun ili kun ĝuo povus aŭdi, kaj kies tekston ili samtempe povus legi en bele presita libro, mia edzino kaj mi preparis surbendigon de ĉi tiu konata rakonto, al kiu ni aldonis klasikan muzikon kaj sonefektojn por substreki la etoson. Estus dezirinde, ke aliaj esperantistoj, kiuj kapablas bone deklami, surbendigu aliajn verkojn el nia literaturo en simila formo. Daŭro: 120 minutojn.

46, 48: Radio Zagreb: 'Raportaĵoj pri la 42-a kaj 43-a UK'. Kvankam la kongresoj de Marseille kaj Mainz jam delonge pasis, estas ankoraŭ nun interese aŭdi ĉi tiujn bone preparitajn (90- kaj 60-minutajn) raportaĵojn. Ili permesas aŭdan partoprenon ĉe pasintaj kongresoj kaj komparon kun la nuna situacio de nia movado.

347: Walter Trobisch: 'Mi amis junulinon'. Albert Lienhardt volis doni al komencantoj modelon de bona prononco. Li surbendigis malrapide kaj klare parolante ĉiujn 55 konfidencajn leterojn inter pastro kaj du afrikaj gejunuloj pri personaj problemoj de amo kaj seksa moralo, kiuj aperis en la samtitola libro (vidu sub 'Miksita literaturo' en la librolisto de

UEA). La tuta programo daŭras ses horojn, do enhavas abundan materialon por aŭdado, sed, por rompi la monotonecon de tiu longega programo, estus dezirinde registri la verkon per diversaj voĉoj. La voĉojn de la geamantoj mi ŝatus anstataŭigi per voĉoj de gejunuloj. Volontuloj bv. anonci sin.

160: Junulara ĥoro el Ljubljana prezentas kantojn. Se vi ŝatas aŭdi diversnaciajn majstre prezentitajn kantojn, tiam vi kun ĝuo aŭdos ĉi tiun programon. Inter la kantoj troviĝas ankaŭ la originale Esperantaj 'Ho, mia kor!' kaj 'La Espero'. 45 minutoj.

87: Islanda programo: 3-hora altnivela programaro pri historio, muziko kaj literaturo de Islando preparita de la Esperantista Societo de Reykjavík. Tiu ĉi programo povas servi kiel modelo por lokaj grupoj, kiuj preparu similajn programojn pri la propra lando, provinco aŭ eĉ urbo.

49: Esperanto-instruado en jugoslavia lernejo: Raportisto de Radio Zagreb surbendigis la plej interesajn partojn de instruado en la 4-a klaso de 8-klasa elementa lernejo kaj intervjuis la instruistinojn. Tiu programon oni povus kun profito prezenti al lernantoj, ĉar la lingvo estas simpla, la enhavo varia, kaj la teksto de la tuta programo estas havebla de la Magnetofona Servo.

338/345: Ok 30-minutaj neformalaj dumkongresaj konversacioj. Ili traktas la plej diversajn temojn kaj estis sukcesplene surbendigitaj de Jim Deer dum la UK en Portland. Ĉi tiun novan specon de programoj lokaj grupoj povus facile mem produkti. Simple petu la plej kompetentajn esperantistojn konversacii, babili aŭ disputi pri iu pli-malpli ĝenerale interesa kaj diskutinstiga temo. La programojn oni sendu al la Magnetofona Servo kaj interŝanĝe oni petu aliajn laŭdezire elekteblajn programojn. Sed ne skribe preparu la konversacion; gravas, ke la fluo de la parolo estu natura.

Rüdiger Eichholz

Komisiito de UEA pri la Magnetofona Servo

RECENZOJ

Havinda verko

Recenzas William Auld (Skotlando):

Doktoro Rosales, de Giorgio Silfer. Milano: "La Patrolo", 1973. 24p. 24cm.

Relative maloftaj estas originalaj dramoj en Esperanto. Tiu ĉi nova teatraĵo, kies premiero okazis en la kadro de la 29a IJK en Sarajevo, estas sufiĉe fortefika kaj prezentinda. Temas pri juĝproceso kontraŭ ginekologo akuzita pro eksperimentoj je artefarita



fekundigo; kvankam li pretendas sciencajn objektiv-econ, li tamen havis psiĥajn problemojn, kiuj instigis lin al lia agado. Malgraŭ violenta interveno de ŝokita publiko, la juĝado okazas tute laŭleĝe — sed tiu sama leĝaro celas fine detrui lin per truko. Interesa apartaĵo estas, ke la doktoro (kiel fremdlandano) rajtas uzi kaj per samtempa tradukado uzigi Esperanton kiel la lingvon de la proceso. Nepre havinda verko.

Mendu ĉe UEA: 3,30 (por Nederlando 3,43) gld. plus sendokostoj 10%.

La vivo parolas pli

Recenzas Koki Tubota (Japanujo):

La paperoj de d-ro Ante Ramljak (A. Ramljak). Zagreb: Internacia Kultura Servo, 1973. 80p. Ilus. 17cm.

Ekzistas homoj, kies vivo parolas pli multe ol iliaj verkoj. D-ro Ante Ramljak (1893-1972) ŝajne apartenis al tiu kategorio; tiel interesa estas la prologo de Marinko Ĝivoje pri liaj karieroj kaj vivo: advokato, enkarcerigito, partizano, poeto (en tiu ĉi libro 7 pecoj tradukitaj de Emilija Lapenna), humuristo, inventisto kaj esperantisto. Lian idealismon montras ankaŭ pledo por Esperanto, kvankam ĝia tono bedaŭrinde iom banalas. Originala kaj unika estas la eseo "Planado de novaj urboj kaj ŝtatoj", kun humura subtitolo treege longa: sen fumo kaj polvo, sen koto kaj ombreloj... Li tie proponas konkretajn rimedojn por konstruo de senakcidenta urbo. La ĉefa ideo estas vertikala kaj horizontala apartigo de piedirantoj kaj aŭtomobiloj. Eĉ se ne transprenitaj rekte, liaj fundamentaj ideoj plenumiĝas en aliaj formoj: aŭto-ŝoseoj, unudirektaj trafikfluo, subteraj strataroj, plilarĝigo de stratoj ktp. Cerbumende restas kial ne malmultiĝas trafikakcidentoj? Ideojn kaj sugestojn pri tiu temo donas tiu ĉi libro.

Mendu ĉe UEA: 7,50 (por Nederlando 7,80) gld. plus sendokostoj 10%.

Libra frandaĵo

Recenzas Louis Beaucaire (Berlino):

La verda raketo, de Jean Forge. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1973. 145p. 18cm. Fotorepreso. ISBN 951-9005-30-7.

Ne sub solida kovrilo, kiel antaŭ 12 jaroj, reaperis *La verda raketo* de Jean Forge, sed finfine ĝi reaperis. Pli bona ja estas broŝurita libro en la mano, ol lukse bindita verko nenie plu trovebla. Dank'al Fondumo Esperanto (Helsinki), la juna generacio povos frandi la represitajn librojn de Jean Forge kaj precipe la dek novelojn de La verda raketo. Ankaŭ maljunaj legantoj reĝuos tiun vervan prozon, en kiu la aŭtoro lasas la bridon de sur la kolo de sia fantazio (hundo bojas Esperante — papago kantas la Himnon), pri-skribas la samideanaron kun sagaca ironio ("*Homoj, kiuj okupas sin pri tia fantaziaĵo, kia estas Esperanto, estas nenormalaj stranguloj*"), en facila, flua, sprita stilo ("*La papago jam dormiĝis kaj lia horloĝa kolego, la kukolo, kukuis la noktomezan horon*"), kiu nepri-gas tujan tralegadon de la libro.

Kompreneble ĝi ne estas aŭtobiografio, sed kiu konas Jean Forge rekonos lin sub pli ol unu maliceta trajto. Ĉu li ne aludis sin mem, skribante: "*Esperanto estas narkotikaĵo, sen kiu li ne povas vivi. Aliaj homoj uzas kokainon, opion aŭ morfinon — li Esperanton*"?

Lasu ankaŭ vin infekti de tiu mirinda malsano. Kaj vi, amiko Forge, pafu al ni novajn raketojn!

Mendu ĉe UEA: 7,20 (por Nederlando 7,49) gld. plus sendokostoj 10%.

Vulgariga traduko, sed ne arto

Recenzas F. de Diego (Hispanujo):

La friponeto de Tormes, de aŭtoro nekonata. Tradukis Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1973. 67p. 17,5cm.

En 1554 aperis en Hispanujo la unua eldono de ĉi tiu anonima novelo, per kiu iniciatiĝis la pikareska* ĝenro tiel karakterize hispana.

La libro — modelo de nigra humuro kaj de socia kritiko — montras al ni la misfortunojn de mizera knabo — ia speco de malheroo — kiu, unue je la servo de blindulo, poste je la servo de diversaj ekleziuloj kaj de malsata hidalgo,** iras tra vivo kruela, kvankam li bonanime akceptas ĝin, kaj al ĝi adaptiĝas fatalisme kaj senskrupule.

"Ergoto de Bonaero" sukcesis nur duone en la serioza tasko traduki tiun faman klasikaĵon. Li faris facile legeblan version kaj lerte redonis la surfacan valoron de la originalo, sed lamiĉe la interpreto de subtilaĵoj, kelkfoje mistrafis la ĝustan tradukon de vortoj kaj esprimoj — aliajn li tute ne tradukis — kaj tre ŝanĝis la stilan ritmon de la originala verko. Kiel vulgariga traduko, *La friponeto de Tormes* taŭgas. Kiel arta versio, apenaŭ.

* pikareska: malheroe aŭtobiografia

** hidalgo: hispana nobelo

Mendu ĉe UEA: 6,30 (por Nederlando 6,55) gld., plus sendokostoj 10%.

Vojaĝo al la antikva Romo

Recenzas Tazio Carlevaro (Svislando):

Saltego trans jarmiloj, de Jean Forge. Helsinki: Fondumo Esperanto, 1973. 191p. 18cm. Fotorepreso. ISBN 951-9005-28-5.

Bedaŭrinde la norda somero estas jam for. Ĉar ĉi tiu libro estas precize unu el tiuj, kiujn oni tiel volonte legas dum ĉe-mara sunumado, aŭ sur kuŝ-seĝo en montara ripozloko.

Temas pri fantazia romano: sen literaturaj pretendoj, sed kun enhavo amuza kaj pluringredienca. Junulo, Kovalo, akcidentiĝas aŭtomobile en la mezo de dezerta erikejo kaj estas flegata en izolita domo, apartenanta al la genia sed iom freneza inventisto Fromaĝi. La domestron ĉirkaŭas kohorto el diversaj homoj: la edzino, la ĉarma filino, la seka kaj aroganta hejminstruistino, profesoro Sovaĝi, orgojla kaj malklera, la aŭtisto Karolo kaj la neniofaristo Tabakaĉ.

La inventisto fine malkovras sistemon por vojaĝi returne en la tempo, kaj la tuta domo tiel retrovojaĝas al antikva Romo, en la reg-tempo de la imperiestro Nerono.

Ili tiel arogante kondutas, kiel malbonedukitaj turistoj, tiel nenion komprenas pri la romia kulturo kaj

civilizo, kaj tiel metas la nazon en aferojn, kiuj ne koncernas ilin, ke la leganto estas vere kontenta, ke la romianoj fine devigas ilin reveturi al la 20a jarcento.

La rakonto estas plena de neverŝajnaĵoj; la psikologia pritrakto de la rolantoj estas tro simpla, preskaŭ simpleca, tiel ke kelkaj karakteroj aspektas palaj, senvivaj. Ankaŭ la priskribo de la romianoj estas manka: ili aspektas kvazaŭ barbaraj sovaĝuloj, superstiĉaj, senciaj, avidaj, drinkemaj, emaj al la uzo de perforto, naivaj. Sed en fantazia romano, ja... fantaziaj romianoj!

Fine, ne mankas romantika amo al la filino de la inventisto, Maria, kaj malplatona amo al (sambela?) romianino, Lydia. He, tiu Kovaloj!

Mendu ĉe UEA: Haveblas ankoraŭ la pli frua eldono je pli malalta prezo: 4,38 (por Nederlando 4,56) gld. plus sendokostoj 10%.

Larĝpenike pentrita



Recenzas Johan Hammond Rosbach (Norvegujo):

Sklavoj de Dio, romano de Géza Gárdonyi. El la hungara tr. Johano Hamvai. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1972. 409p. 20cm.

Nek en mia iom ampleksa eŭropa literaturhistorio, nek en la norvegaj enciklopedioj oni mencias la hungaran aŭtoron Géza Gárdonyi. Tio nepre ne signifas, ke li ne estas leginda. Sed tio verŝajne signifas, ke li ne estas multe tradukita. Per redono en Esperanto ebligas por la mondo konatiĝi kun li — ja ne multaj regas la hungaran lingvon.

Sklavoj de Dio estas dika romano, efektive kvarcentpaĝa. Oni do komprenas, ke nenio rapide okazas, sed ke, male, ĉio estas larĝpenike pentrita. Se oni ŝatas tiajn romanojn, oni legu ĉi tiun libron.

Ĝi temas pri la vivo en hungara monaĥejo en la 13-a jarcento. Ni renkontas la vivon tie, la strangajn kutimojn, la vivon de Sankta Margareta. La plejmulton ni vidas per la okuloj de frato Jancsi, kiun ni akompanas el lia vilaĝo, kaj kies pensojn kaj mirojn ni ekkonas. Oni devas nepre admiri la scion de la aŭtoro pri ĉiuj detaloj de la tiutempaj moroj kaj ĉiutagaĵoj, kaj kun multe da simpatio oni turnas la paĝojn de la romano.

La tradukinto, J. Hamvai, faris gigantan kaj ne ĉiam facilan laboron. La traduko estas vere bona. Tamen oni eble faru kelkajn etajn rimarkigojn. En la enkonduko la tradukinto "opinionas nepre gardindaj la naciajn personajn nomojn, sed la fremdnaciajn kaj internacie konatajn uzis en Esperanto" — tamen li nomas la saman personon Humberto, Umbertus kaj Humbertus. Kelkloke li "kaŝas sub breton", aliloke "kaŝas sub breto". Mi ankaŭ ne volus uzi akuzativon en esprimoj kiel "starigi tien". "Truetoj po larĝo de du manplatoj" estas nepre evitinda esprimmaniero.

Sume: aĉetinda kaj leginda libro.

Mendu ĉe UEA: 10,50 (por Nederlando 10,92) gld. plus sendokostoj 10%.

Prefere la Zamenhofan

Recenzas William Auld (Skotlando):

Popido: la verda dialekto, de Manuel Halvelik. Brugge (Belgujo): la aŭtoro, 1973. 54 p. Ilus. 29 cm.

Manuel Halvelik trovis por si agrablan hobion: la kreadon de Esperanto-variantoj. Pli frue, arĥaika Esperanto; nun, dialekta Esperanto. Neniu supozu, ke mi mokas lin. Male, la problemoj, kiujn li volas solvi, estas realaj, kaj mi simpatias al liaj klopodoj. La problemon de dialekta parolado apud norma parolado jam frontis en literaturaj tekstoj Baghy, Mijake k.a. Halvelik tamen konsekvence provis krei dialekton uzeblan en ĉiuj kuntekstoj, kie tio estus dezirinda; li tion faris per kelkaj drastaj, sed malmultaj, ŝanĝoj de ĉefe la finaĵoj kaj kunligaj vortetoj de la normala Esperanto. Ilustre, li tradukis tekstojn, kiuj enhavas dialektajn parolojn, el kvar lingvoj. Ĉu lia provo sukcesis? Nome, ĉu ĝi havas realan ŝancon esti akceptita? Sincere, al mi ŝajnas, ke ne. Ne temas pri la obstina kontraŭstaro de bigotaj fundamentistoj, sed pri la kvalitoj de la dialekto mem: ĝi estas, laŭ mia opinio, nek belsona nek belaspekta; kaj, kvankam sperta esperantisto kapablas ĝin regi tre rapide, tamen al la ordinara leganto de la tradukita teksto ĝi certe aspektos forpuŝa kaj nekomprenebla. Se mi bezonas dialekton, mi preferos uzi la zamenhofan reformprojekton de 1894.

Mendu ĉe UEA: 17,40 (por Nederlando 18,10) gld., plus sendokostoj 10%.

LASTE APERIS

Amuzaj dialogoj en Esperanto (1973) A. Lienhardt. 141p. Ilus. 22cm. Broŝ. 4,50 gld. Dudek konversacioj kun ekzercaj demandoj kaj respondoj, celantaj instrui la vortojn de la ĉiutaga vivo.

Esperanto keele õpik (1973) J. Ojalo. 135p. 21cm. Bind. 1,80 gld. 22-leciona kurso laŭ gramatika metodo, kun ampleksaj legotekstoj, solvo de la ekzercoj kaj vortareto.

Greneroj por la animo, dua parto (1973) S.V. 23p. 15cm. Broŝ. 0,90 gld. Ses edificaj artikoloj represitaj el *Dia Regno*.

Nova Geografio (1971) Nio. 31 + 12p. 17cm. Broŝ. 3,30 gld. Projekto por decimaligo de la geografia kaj tempa mezursistemoj.

Patroj kaj filoj I.S. Turgenjev (1818-1883). El la rusa trad. K. Bein (1909). 215p. 20cm. Broŝ. 10,80 gld. Fotorepreso de la dua eldono, kiun lingve reviziis la Literatura Komitato de SAT.

Poŝtkartoj "Historiaj restaĵoj elterigitaj en Ĉinio", dua serio. (1973) Fremdlingva Eldonejo, Pekino. Plua serio de 12 koloraj bildkartoj pri statuetoj kaj vazoj. Unu serio 0,72 gld.

Primoŝten Ilus. turisma faldfolio. 21 x 10 cm. Ricevebla ĉe: Hotel Adriatic Primoŝten, Jugoslavio.

Rozmówki Esperanckie (1973) A. Pettyn. 247p. 15cm. Broŝ. 3,30 gld. Laŭtema frazaro pola-Esperanta.

Salome (1893) Wilde (pseŭd., 1854-1900). El la angla tradukis T. Chif (1922, fotorepreso 1973) 51p. 18cm. Broŝ. 2,40 gld. Teatraĵo laŭ la biblia rakonto.

Ĉiujn mendojn adresu al: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj k.c. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

R
E
C
E
N
Z
O
J

LOKE – FAKE – PERSONE

FINNLANDO. La 9an de novembro 1973 je la horo 11.20, en Helsinki, la prezidanto de Finnlando s-ro Kekkonen akceptis delegitaron de Esperanto-Asocio de Finnlando, kiu transdonis al li la Rezolucion de la 58a UK en Beograd. Prezidanton Kekkonen aparte interesis la 5-landa pedagogia eksperimento pri Esperanto-instruado. Pri tio lin detale informis s-ro P. Järvinen, kiu, subvencie de la Finnlanda Lerneja Administracio, partoprenis la konferencon de ILEI en Maribor. Sur la foto de maldekstre dekstren: s-ino Milma Männistö, s-ro Pentti Järvinen, s-ino Heta Kesälä, s-ro Pekka Virtanen (prez. de EAF) kaj la prezidanto de Finnlando d-ro Urho Kekkonen.



LOKE

Bengalujo

- La registaro de Okcidenta Bengalujo (Hinda Unio) renovigis la direktivon pri anstataŭigo de la angla per la bengala lingvo en registaraj oficejoj. La direktivo, el 1964, restis ĝis nun neplenumita. Ankaŭ la novajn provojn ekuzigi la bengalan la oficistoj rifuzas pro la argumento, ke ĝia uzo estus diskriminacia kontraŭ la nebengalaj minoritatoj.

Italujo

- Tre sukcesa estis ĉi-jare la 44a Itala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Trento. Ĉi-okaze la Trenta Turisma Instanco eldonis belegan libron "Renkonto kun Trentino", kiun ĉiu partoprenanto ricevis donace. La kongreso resumis la lastajn atingojn de Esperanto en Italujo. En la loka ĵurnalo *L'Adige* aperis ampleksa artikolo "Esperanto en lernejoj, en laboro, en politiko". Okaze de la kongreso oni oficiale inaŭguris stratan pasejon je la nomo de "Giovanni Peterlongo, urbestro de Trento, dantisto, esperantisto", la tradukinto de "Dia Komedio" de Dante.

Koreujo

- Ekde 1965 en la Universitato Meong-Ji de Seŭlo Esperanto figuras kiel elektebla studobjekto. Krom regulaj universitataj kursoj, la Universitato organizas ankaŭ somerajn popolkursojn. Tiuj de Esperanto estis anoncitaj ĉi-somere la 10an fojon. Kaj ĉi-foje pli ol 600 personoj aliĝis al la kursoj, el kiuj 380 gestudentoj el aliaj 43 universitatoj de Seŭlo. Dum la pasintaj 7 jaroj la 9 antaŭajn somerajn kursojn partoprenis entute 2 400 personoj. Notinda estas diversa socia konisto de la kursaliĝintoj: ŝtatoficistoj el ministerioj pri defendaj, komercaj, ekonomi-planaj, transportaj kaj telekomunikaj aferoj, inĝenieroj pri komputiloj, telekso, mikrofilmo, mikroondo, telefono,

aŭtomobilo, instruistoj de diversgradaj lernejoj kaj administristoj de privataj firmoj kaj kompanioj.

Norda Eŭropo

- Raportante (73-07-20) pri la 16a laborista konferenco de la landoj ĉe la Balta Maro kaj Norvegujo kaj Islando, kiu okazis en Rostock (GDR) dum julio, la finna socialdemokrata ĉefgazeto *Suomen Sosialidemokraatti*, sub la trikolona titolo "Nur la lingvaj malfacilaĵoj malhelpis la amikecon" skribas: "Inter la finnaj partoprenantoj regis dum la tuta kongreso unuanima volo progresigi la kunlaboron kaj sekurecon de Eŭropo..... La amikecon kaj kamaradecon malhelpis ĉefe nur la lingvaj malfacilaĵoj."

Svedujo

- Ekde la fino de septembro ĝis la mezo de novembro s-ro Jean Guillaume, Francujo, faris tra Svedujo prelegvojaĝon. Li veturis per sia aŭto entute ĉ. 7 400 km. kaj prezentis tri diversajn elekteblajn temojn kun kolorbildoj. Prelegis en Esperanto-kluboj, neesperantistaj societoj ĝis la plej norda urbo Umeå en Nordlando. Pluraj artikoloj en la gazetaro.

FAKE

Ekspozicio

- La Universitato de Debrecen (Hungarujo) organizis Esperanto-ekspozicion lige kun la Somera Universitato 73-07-31 — 08-20, kiu vekis intereson de la publiko. Bone estis prezentita la Esperanto-movado de la pli fruaj periodoj. Sed pri la nuntempa movado mankis sufiĉaj materialoj. (Ni atentigas ĉiujn organizantojn de ekspozicioj, ke estas disponeblaj abundaj materialoj, daŭre aktualigataj, en la Universala Ekspozicio iniciatita de CED. Pri la kondiĉoj de prunto informas la Centra Oficejo de UEA. Vidu ankaŭ *Esperanto* 1972, p.73 kaj la artikolon "Kiel aranĝi ekspozicion?" de I. Lapenna, p.108).

LOKE - FAKE - PERSONE

Gastlaboristoj

- La fenomeno de la gastlaboristoj en landoj de E. E.K. naskas amason da problemoj, interalie ankaŭ lingvaj kaj edukaj. Nur parteto el tiaj demandoj fojfoje troviĝas en la tagordoj de diversaj instancoj kaj institucioj de E.E.K., kaj eĉ se oni principe interkonsentas pri solvoj, poste pasas monatoj aŭ jaroj, antaŭ ol oni ekrealigas la interkonsentojn. Precize tiel okazis post studkonferenco en Torino (oktobro 1972), kie pluraj internaciaj kaj eŭropaj organizaĵoj interkonsentis, ke Eŭropa Sociala Fonduso subvenciu eksperimentajn lingvokursojn, bazan fakedukon kaj kapabligon de instruistoj, kiuj okupiĝu pri la gastlaboristoj. Tamen, ankoraŭ en aŭtuno ĉi-jare s-ro Vredeling, nederlandano, eksa membro de Eŭropa Parlamento, starigis skriban demandon al plenumorganoj de E.E.K., kial oni ne ekpraktikas la torinajn decidojn, je kio li ricevis promesojn pri baldaŭaj paŝoj tiurilate.

Gazetaro

- Aperis la 1a regula numero de la porinfana ilustrita revuo "Juna amiko". Ĝi havas kunlaborantojn en multaj landoj. Ĝia materialo taŭgas ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenaĝaj komencantoj. La sekvanta numero aperos en januaro 1974. Sub aŭspicio de ILEI ĝin eldonas Hungara Esperanto-Asocio.
- Aperis la unua numero de nova Esperanto-revuo "Venezuela Stelo". Ĝi estas parte hispanlingva, parte en Esperanto. Eldonanto: Asociación Venezuela de Esperanto, Apartado 3833, Caracas 101, Venezuela.
- La eldonadon de la kultura, socia kaj literatura revuo "Norda Prismo" transprenis Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando. La abono pagita por 1973, dum kiu "Norda Prismo" ne aperis, validos por la jaro 1974.

Lingvistiko

- En la jarkunveno 1973 de Modern Language Association of America (Usona Asocio por Nuntempaj Lingvoj), kiu okazos en Chicago de la 27a ĝis la 29a de decembro denove funkcios Esperanta laborgrupo, kie estos pritraktitaj diversaj aspektoj de la Internacia Lingvo, kiel ĝia lingvistika kaj pedagogia valoro, varieco, poezio en Esperanto ktp. La partoprenantoj ricevos la referatojn anticipe por ebligi utilan diskuton la 28an de decembro.

Pedagogio

- La Bulteno de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto publikigis en sia septembra numero ekstrakton el letero de la eminenta usona lingvisto d-ro Mario Pei al d-ro S.J. Drake, prezidanto de Fort Lauderdale (Fla.) University, kie Esperanto-kursoj regule eniris la studprogramon. La fama lingvisto pritraktis en la citita letero la propedeŭtikan valoron de Esperanto.

PTT

- Poŝtmarko kun Esperanta teksto (vidu foton) estos presita sur oficiala poŝtkarto de Hungarujo, kiu aperos la 28an de decembro 1973. Similajn poŝtaĵojn kun surprisita esperantteksta poŝtmarko eldonis antaŭe Aŭstrujo memorige pri speciala flugo Wien-Philadelphia, kaj dufoje Pollando: en 1962 okaze de la 75-jara jubileo de Esperanto, en du valoroj (40 groŝoj kaj 1,50 zlotoj) kaj en 1966 memorige pri 20 jaroj de Esperanto en Pola Popola Respubliko.



Radio

- Ĉiam pli malkreskas la anglalingvaj elsendoj en Pakistano kaj Turkujo. La duhora pakistana elsendo por pakistanoj loĝantaj en Britujo nun estas prezentata en la du pakistanaj lingvoj: urdua kaj silhetia. Same en la iama Orienta Pakistano, nun Bangladeŝo, malpliigis la rolo de la angla lingvo favore al la oficiala landa lingvo, la bengala. Pro la malfortiĝo de la angla en la Suda Azio, simila komunikado venas de la Turka Radio-Televido en Ankaru, kiu ekde la somero 1973 nuligis siajn ĉiutagajn anglalingvajn elsendojn sur la kurtandoj por la Suda Azio, pro la manko de respondoj de anglalingvaj aŭskultantoj en Hindujo, Pakistano, Sri-Lanko kaj Bangladeŝo. La Turka Radio daŭrigas siajn anglalingvajn elsendojn nur por la Britaj Insuloj.

Sporto

- La 15a Internacia Esperanto-Skisemajno okazos apud Maribor de la 9a ĝis la 16a de februaro 1974. Informojn petu de Jovan Mirković, YU-62000 Maribor, Filipičeva 21, Jugoslavio, aldonante poŝtmarkon aŭ internacian respondkuponon por respondo.


Televido

- En Washington D.C. (Usono) estas preparata 30-minuta televidprogramo pri Esperanto. Ĝi estos prezentita la 18an de januaro de la 10a ĝis la 10h30 vespere per televidstacio WETA, direktita al universitatoj kaj intelektuloj.
- La 8an de novembro 1973 la aŭstra televido elsendis la 15-minutan koloran filmon "Aŭstralio hodiaŭ", kiun akompanas esperantlingva komentario.

Turismo

- Antaŭvide al la granda turisma movado al Romo dum la sankta jaro 1974-1975, la provinca turisma organizaĵo de Romo sin deklaris preta republikigi bildajn broŝurojn pri romaj monumentoj kaj vidindaĵoj en Esperanto, kondiĉe ke ĝi konstatu grandan intereson por tiaj eldonaĵoj. Do interesatoj senprokraste petu esperantlingvajn broŝurojn skribante al: E.P.T., Via Parigi 1, I-00187 Roma, Italujo.
- Aktive ekagis la faka asocio Monda Turismo, nun en kontrakta kunlaboro kun UEA. Inter ĝiaj iniciatoj menciindaj estas konkurso pri la plej bona Esperanto-varbilo kaj la servo "Intergast", simila al tiu junulara "Pasporta servo". Per informoj: Monda Turismo, PK 45, Sofia-C, Bulgarujo.





PERSONE

Sygnarski

• Profesoro Mieczysław Sygnarski en Krakovo (Polando), naskiĝinta en 1889-11-30, ricevis ŝtatan distingon "Polonia Restituta" pro la laboro por Esperanto. Krom instrui Esperanton en gimnazio kaj universitato kiel lektoro de Esperanto, li eldonis Esperanto-lernolibrojn por meslernejoj, aprobitajn de la Ministerio por Klerigo, kaj tradukis romanojn, i.a. "Kiu kulpas?" de Jan Reytan kaj "En dezerto kaj arbarego" de Mennik Sienkiewicz, kiun lastan oni filmis ĉi-jare. Estante nun 84-jara, li tiel vigle kaj interese instruas Esperanton en universitataj kursoj, ke neniu kredas pri lia aĝo.

Szerdahelyi

• La 8a Esperanto-kurso en la somera Universitato de Turku okazis la 25-30 junio 1973. Ĉi-foje la kurson gvidis universitata profesoro pri Esperanto (lingvo kaj literaturo) en Budapeŝto, István Szerdahelyi. Vigle kaj interese li gvidis instruistojn kaj studentojn tra la lingvo Esperanto, donante samtempe vastajn perspektivojn de la monda lingva problemoj.

NEKROLOGOJ

LUDVIK PREBIL (1900-1973)

La 16an de oktobro, en Maribor (Jugoslavio), forpasis unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Jugoslavio, s-ro Ludvik Prebil. Naskiĝinta en 1900, li eklernis Esperanton en 1926 kaj de tiam aktive partoprenis en la movado. La plej grandan kontribuon li faris kiel sekretario de la Konstanta Organiza Komitato de la Kunordiga Konferenco por enkonduko de Esperanto en lernejojn, kaj lia laboro sur tiu kampo estis la fundamento de la nun daŭranta kvinlanda oficiala lerneja eksperimento. Inter 1928 kaj 1973 li plenumis krome multajn oficojn en la loka, distrikta kaj landa movadoj de Jugoslavio. Ĉe lia enterigo parolis i.a. d-ro P. Zlatnar en la nomo de Slovenia Esperanto-Ligo.

E. GÖRLICH (1905-1973)

La 4an de oktobro 1973 mortis E. Görlich, doktoro pri historio kaj germana literaturo, aŭtoro de romanoj kaj sciencaj verkoj, inter kiuj "Historio de Aŭstrio". Krome, li estas aŭtoro de la oficiala himno de la aŭstra provinco Burgenland. Lerninte Esperanton en 1919, li aktive partoprenis la movadon, plurfoje prelegis en ISU kaj dum multaj jaroj estis lektoro de Esperanto en altlernejoj kaj direktoro de la Ŝtata Ekzameno-Komisiono por Esperanto en Vieno.

ALAJOS SZIROM (1900-1973)

La 27an de oktobro 1973 mortis Alajos Szirom, delegito en Pécs (Hungarujo), prezidanto de la loka Esperanto-grupo "Sopianae". 50 jarojn s-ro Szirom agadis por la movado.

"HOMO kaj KOSMO"

Jam la 11an jaron aperas plaĉa laŭ aspekto kaj formato (14,7 x 21,0) kvaronjara Esperanto-revuo "Homo kaj Kosmo". Ĉiu ĝia numero ampleksas pli ol 30 paĝojn da popularsciencaj artikoloj, interesaj laŭ enhavo kaj bonaj el lingvistika vidpunkto. La revuo estas eldonata de Astronomia Observatorio de la Kroata naturscienca societo, Zagreb (Jugoslavio), kaj la temaro estas precipe astronomia, sed ne limige, ĉar tuŝanta la plej diversajn sciencajn fakojn, kion perfekte resumas la titolo de la revuo. Tamen probable pro nesufiĉa reklamado de la revuo fare de la eldonistoj, multaj kiuj sopiras al nepriesperantaj legaĵoj en la Internacia Lingvo, ankoraŭ ne malkovris tiun ĉi juvelon el popularsciencaj eldonaĵoj. Rezulte la revuo sin trovis en minaca situacio kaj devis aperigi en sia lasta numero (2/1973) atentigon, kiun ni resume publikigas ĉi-sube:

Estas grava danĝero, ke la revuo "Homo kaj Kosmo" malaperos pro manko de subteno. Por eviti tiun malfeliĉon, la redakcio petas ĉiujn legantojn, kiuj serioze deziras plue aboni la revuon, tuj kaj NEPRE informi pri tio. Samtempe la redakcio petas ĉiujn abonantojn en pagipovaj landoj sendi abonon por ĉi tiu duonjaro (t.e. por ja jam ricevataj numeroj): 5,50 gld. aŭ egalvaloro.

Ni varme rekomendas al ĉiuj aboni tiun vere subtenindan revuon. Ili certe estos rekompencitaj per vere valora enhavo de la revuo. Abonojn peras la Libro-servo de UEA.

MEMORIGA KALENDARO

Decembro

26-5/1 E-skiferioj, Adelboden, Svislando
27-3/1 16a int. seminario de G.E.J., Kassel, FRG
28-2/1 2a vintra E-feriado, Budapeŝto, Hungarujo
31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

1974 Januaro

2-9 19a Aŭstralia E-kongreso, Brisbane
4-8 39a Kongreso de Nov-Zelanda E-Asocio, Wanganui

Februaro

1-6 Vintra E-semajno, Pamporovo, Bulgarujo
9-16 15a int. E-skisemajno, Maribor, Jugoslavio
18-24 Semajno de Internacia Amikeco

Marto

31 Limdato por la Belartaj Konkursoj
31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas

Aprilo

12-15 58a Brita E-kongreso, Sheffield
14 Zamenhof mortis en 1917
27 Limdato por la Internacia Ekzameno

Majo

11-12 6a kultura E-semajnfino, Renens, Svislando
11-17 26a IFEF-kongreso, Tarragona, Hispanujo



HAMBURGO VOKAS

59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 – 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Federacia Ministro pri Klerigo kaj Scienco.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

Postkongresi en Bavarujo


La Oficiala Postkongreso okazos en la mezepoka urbo Kronach, kiu situas en norda angulo de Bavarujo, norde de Bayreuth kaj proksime de Germana Demokratia Respubliko kaj Ĉeĥoslovakujo. La fervoja veturo Hamburg-Kronach kostas ĉ. 40 markojn, kaj estas troveblaj hotelaj litoj je la prezo 10-15 markoj. Kronach, naskiĝloko de la fama pentristo Lucas Cranach (1472-1553), posedas 800-jaran fortikaĵon kaj multajn aliajn allogaĵojn.

Dancante al la 59a

Sub tiu titolo aperis prospekto pri skandinavia trajnvojaĝo al la 59a Universala Kongreso, por kiu estas rezervita danc- kaj restoraci-vagono ekde Kopenhago ĝis la pramŝipa haveno Rødby. La organizantoj prizorgas rezervitajn lokojn ekde Stockholm, Oslo kaj Helsingør. Adreso: Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj, Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando; tel. (01) 60 07 02.

Aliĝado kontentiga

Ĝis la 8a de decembro 1973 aliĝis al la Universala Kongreso en Hamburgo jam pli ol 400 personoj el



Karakteriza aspekto de Hamburgo

37 landoj. Tio estas nombro jam pli alta, ol en la sama dato por pluraj aliaj el la lastaj Universalaj Kongresoj.

Muziko el Ĉeĥoslovakujo

La juna Kvarteto Esperanto el Ĉeĥoslovakujo jam konatiĝis antaŭ internacia publiko en Beograd, kie ĝi ludis popolkantojn kaj modernajn kanzonojn en la Internacia Vespero kaj dum la Balo. Bonvena ĝi estos ankaŭ en Hamburgo, kies Loka Kongresa Komitato invitis ĝin por muzika akompano de pluraj kongresaj aranĝoj.

LKK-prezidanto en Rotterdam

La Universala Kongreso, precipe la planoj por la ĉefaj oficialaj aranĝoj, estis diskuttemo de kunsido de estraranoj de UEA en la Centra Oficejo en Rotterdam, la 8an de decembro. D-ro Werner Bormann, la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, estas samtempe estrarano de UEA kaj vizitis Rotterdam por la kunsido.

INTERPAROLOJ KUN LA ALTA PROTEKTANTO DE LA 59a UK

Kvarpersona delegitaro de la LKK, sub prezido de d-ro W. Bormann, interparolis kun la Alta Protektanto de la 59a Universala Kongreso, federacia ministro pri klerigo kaj scienco d-ro Klaus von Dohnanyi, dum ties vizito al Hamburgo fine de novembro. Al la ministro estis ankaŭ prezentita la oktobra numero de *Esperanto* kun lia portreto sur la paĝo de Oficiala Komunikado pri la Kongreso. D-ro von Dohnanyi konstatis, ke li povas kompreni esperantlingvan tekston. La ministro interesiĝis pri pluraj aspektoj de la Kongreso, kaj rimarkis, ke dum la lastaj jaroj preskaŭ ĉiam la kongresojn patronas altaj ŝtatsfunkciuloj. Sur la foto: la Alta Protektanto de la 59a UK d-ro K. von Dohnanyi (maldekstre) kaj la prezidanto de LKK d-ro W. Bormann. (Fotis Milan Sudec).

DALTONISMO

"Diru, paĉjo, kiel nomiĝas tiuj ruĝaj beroj?"
"Ili ne estas ruĝaj, mia kara, sed bluaj."
"Aŭskultu, paĉjo, kiel vi do klarigas, ke ili aspektas flavaj?"
"Ha, mia knabo, tutsimple pro tio, ke ili estas ankoraŭ verdaj."

BONEDUKITECO

Sinjinorino Zarzanja *rehejmiĝis* post dumonata libertempo kaj *senprokraste* inspektis la tutan domon. Kun indigno ŝi konstatis, ke sur ĉiuj mebloj kuŝas fingrodika tavolo da polvo.
Anĝelika, la dommastrino, kiu estis ŝargita prizorgi la domon dum ŝia foresto, estis tuj vokita. "Rigardu," furiozis sinjinorino Zarzanja, "ĉie kuŝas polvo tiel dense, ke mi povas perfingre skribi mian nomon en ĝin."
"Tio povas esti, sinjinorino", diris Anĝelika, "sed bonedukita damo ja ne faras ion tian."

FUNEBRA PAROLADO

La maljuna vilaĝ-instruisto estis *forpasinta*, kaj la vilaĝestro, starante ĉe la nefermita tombo, faris adiaŭan paroladon. Plena de emocio li oratoris: "Fidela koro kaj du nelacigeblaj manoj ĉesis bati."

PRI GUSTOJ ONI NE DISPUTU

Flipo staras ĉe la bufedo en kafejo, kaj al siaj kamaradoj li fanfaronas pri la ĉarmoj de sia nova amatino. Neatendite, lia nov-akirita trezoro eniras la trinkejon. Ŝi estas la vera portreto de *birdo-timigilo*. Plata nazo, tro granda buŝo, iom straba. Flipo, rimarkante la konsterniĝon de siaj amikoj, murmuris embarasite: "Mi tre bone komprenas, ke ne ĉiuj ŝatas Pikaso'n (Picasso)!"



KUNIKLO

Peĉjo faras, la unuan fojon, la marvojaĝon de Kalezo (Francujo) al Dovro (Britujo). La *tangado* de la ŝipo kaŭzas al li malagraban senton en la stomako. "Paŭzo," li diras timeme.
"Kio estas, mia knabo?"
"Ĉu vi estas tute certa, ke la kuniklo, kiun ni manĝis tagmeze, estis vere mortinta?"

MEMREGADO

Du amikoj forlasas Kazinon, kie ili ludis *ruleton*. Unu el ili estas tute nuda, la alia surhavas ankoraŭ sian kalsoneton. Diras la unua al la dua: "Mi sincere admiras vin, ĉar vi scias almenaŭ ĝustatempe ĉesi."



KONSOLO POR NIAJ POETOJ

Dum artista balo juna poeto dancas kun iom velkinta sinjinorino, kiu konfidas al li: "Pasintan jaron mi aĉetis vian poemaron. Mi estis tute ravita. Viaj poemoj estas belegaj."
"Dankon," diras la poeto, flatite. Post kelkminuta pripensado, li aldonas: "Ĉu estas vi, kiu aĉetis ĝin?"

DIFINO

Kio estas politikisto?
"Estas iu, kiu oferas vian vivon por sia patrujo."

KLIMATO

Anglo, vojaĝante tra Skotlando, trafis tie la proverban skotlandan veteraĉon; senĉese pluvadis. "Bubo," li diris al malgranda skoto, kiu sidis apud la vojo, "ĉu vere ĉiam pluvadas en tiu ĉi lando?"
"Ne, sinjoro, kelkfoje ankaŭ neĝas."

LA DOLĈA FRANCUJO

Franca kuracisto, ekzameninte novan pacienton, diris al li: "Tio, kion vi nepre devus fari, estas trinki almenaŭ duoble pli da akvo ol da vino."
Al kio respondis la paciento: "Duoble pli da akvo? Sed tio ne eblas! Mi jam trinkas kvar litrojn da vino ĉiutage!"

Klarigoj:

daltonismo: nenormalaĵo en la vid-kapablo, kiu konsistas en tio, ke oni ne povas bone distingi la kolorojn (kolorblindeco).
re-hejm-iĝ-i: reveni hejmen.
sen-prokrast-e: sen prokrasto, tuj, sen perdi tempon.
for-pas-int-a: de la verbo "for-pasi" (morti). Kondolenci iun pro la forpaso (morto) de amiko.
birdo-tim-ig-il-o: ilo (aĵo-instrumento), per kiu oni timigas la birdojn, tiel ke ili forflugas (ofte uzata en fruktarbejoj).
tang-ad-o: de la verbo "tangi" = ruliĝado de ŝipo sur la ondoj.
rulet-o: hazardo-ludo pri mono.

HEREDAĴOJ

Wijpkje Steffering

Kiel vi jam legis en la junia numero de Esperanto forpasis en la 14a de majo fraŭlino Steffering en Leeuwarden, Nederlando. F-ino Steffering, kiu dum sia vivo multe laboris por progresigi la Internacian Lingvon en la nederlanda provinco Frislando kaj ekster ĝi, en sia testamento destinis grandan parton de sia havaĵo al Esperanto-unuiĝoj. Al UEA ŝi heredigis tri kvaronojn de siaj valorpapiroj. Tio signifas, ke UEA ricevis diversajn akciojn kaj obligaciojn, kiuj kune nun havas la valoron de 8 300,— gld.

Klara Răz

F-ino Klara Răz estis tre malnova kaj fidela membro de UEA en Svislando. Ŝi forpasis en la fino de 1972. Ankaŭ ŝi en sia testamento favoris UEA-n, tiel ke UEA ricevis el ŝia heredaĵo sumon de 440,— gld.

Belle Parsons Clewe

Alia malnova membro de UEA, s-ino Clewe en Los Angeles, Usono, faris testamenton ankaŭ favore al UEA. Ŝi forpasis jam en oktobro 1970. Okazis kelkaj malfacilaĵoj pri la testamento, sed nun UEA ricevis 611,— gld.

William Hudson King

S-ro King, kiu forpasis en la komenco de 1972, estis dum multaj jaroj fidela delegito en Whangarei, Nov-Zelando. En sia testamento li postlasis al UEA sumon de 183,— gld.

Nome de la Estraro de UEA, mi esprimas tutkoran dankon pro la fakto, ke ĉi tiuj fidelaj membroj de UEA pripensis, ke ankaŭ post ilia forpaso UEA bezonas financojn por daŭrigi sian laboron kaj antaŭenigi siajn celojn.

E.J. Woessink
estranaro pri financoj

MEMORIGO

Ni afable atentigas ĉiujn membrojn kaj abonantojn, ke la kotizoj de UEA validas ĉiam por la kalendara jaro. Tiuj, kiuj ne estas dumvivaj membroj nek jam antaŭpagis por 1974, bonvolu do kiel eble plej baldaŭ kotizi por la nova jaro. La listo de aktualaj kotizoj en la diversaj valutoj aperis en la septembra numero de Esperanto. Listo de landaj kotizperantoj aperas en Jarlibro, kaj kelkaj ŝanĝoj en tiu listo intertempe aperis en la oficiala informilo. Frua pago multe helpas nian administradon. Antaŭdankon!

NOVA ĈEFDELEGITO POR HISPANUJO

Interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA kaj konforme al la art. 14 de la Ĝenerala Regularo, Hispana Esperanto-Federacio nomis novan ĉefdelegiton por Hispanujo por transpreni la oficon de s-ro R. Molera, kies demision ni anoncis en la septembra numero. La nova ĈD estas: S-ro Luis M. Hernández Yzal, Av. Generalísimo 13, apartado de Correos 83, Villafranca del Panadés, Sant Pau d'Ordal, Hispanujo; tel. n-ro 5. La membroj en Hispanujo bonvolu estonte adresi ĉiujn siajn kotizojn al s-ro Hernández Yzal.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Horňák, J., Ĉeĥoslovakio. Kolle, A.; Larsen, P.B., Danlando. Woite, E., FR Germanujo. Syozi, N.; Yamasaki, S., Japanujo. Erickson, L.; Lewis, H.J.; McMurtry, f-ino E., Kanado. Van den Beld, A.J.M.; Hagelen, f-ino B.W.; Kroon-Rentinck, s-ino J. M.; Mantingh, s-ino G.B.J.; Pitstra-Rozema, s-ino A., Nederlando. Boersma, f-ino N.A.; Gessaga, f-ino N.; Lavanchy, J.J., Svislando. Kao, rev. J.B., Taivano. Dahnke, J.L.; Dougherty, M.; Lesh, J.K.; Williger, E., Usono.

NOVAJ MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1973

307 P.O.P. Andersen, 308 A. Bechmann Sørensen, Danlando. 309 W. Akkerman, 310 N.L. Daams, 311 J.P. van Dijk, 312 J. Flach, 313 A.A. Laverman, 314 J.L. Muller, 315 D.M. Ponti, 316 E.L.M. Wensing, Nederlando. 317 A. Armanis, Norvegujo. 318 H. De Sassi, 319 H.W. Grossmann, 320 L. Grutter, 321 F. Welter, Svisujo. 322 A.H. Correa, 323 G. Fellner, 324 E.F. Lacy III, 325 K. Thomson, 326 P. Wegher, Usono.

Flugo enkotiĝinta en lingvomiskomprenoj

Tio okazis la 5an de junio, en Londona flughaveno. Ĉirkaŭ 250 pasaĝeroj estis en giganta jeto, kiam sin prezentis iranano kun valizeto plena de armiloj kaj deklaris, ke sep liaj kolegoj jam estas enjetoj. La sekureca gardistaro de la flughaveno, alarmita, ordonis al ĉiuj pasaĝeroj eljeto.

Oni povas imagi, kian nervostreĉon travivis la pasaĝeroj kaj la flughavenaj respondeculoj, ĝis kiam klariĝis,

ke la alarmon kaŭzis nur la malbona scio de la angla lingvo fare de la iranano, kiu estis unu el la sekurecgardistoj de la irana nacia aerlinio survoje al Nov-Jorko, el kie ili estis akompanontaj iun iranano flugon. Intertempe la giganta Boeing 747 de BOAC sinkis en la koton, kaj la pasaĝeroj, inter kiuj la ok irananoj, ĝis la dentoj armitaj, sekurecgardistoj, devis ekvojaĝi al Nov-Jorko per alia flugo.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1973, Unua Parto, pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj).

Aŭstralio: Shepparton. **Brazilo:** Rio de Janeiro (D, FD-oj: biblioteko, ekonomio, impostoj, matematiko, muziko, petrolrafinado, teatro), Belo Horizonte (VD, FD besto-bredado). **Britujo:** Havering, Welwyn Garden City. **Jugoslavio:** Bedekovčina (FD turismo), Vela Luka. **Nederlando:** Diepenveen. **Pollando:** Bydgoszcz. **Sud-Afriko:** Pretoria (D).

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-01-15 neniuj membroj protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Brazilo: Oscar de Souza Mello, D kaj FD Aquidauana. **Danlando:** Alf Bechmann Sørensen, FD Nørresundby. **Finnlando:** f-ino Sirkka Salmivaara, FD Turku, Toivo Talikka, JD kaj FD Vantaa. **FR Germanujo:** Manfred Führer, FD Eschborn, Traudel Bengsch, FD Leinfelden-Oberaichen, Ludwig Robel, FD Kronach, Georg C. Sack, FD Heidelberg, Hans-Hermann Rüttiger, D kaj FD Halle. **Grekujo:** Johano Vajenas, FD Athinai. **Hungarujo:** Ferenc Phersy, FD Budapest.

Israelo: Chasko Armony, FD Haifa. **Japanujo:** Hideki Harada, FD Okayama. **Jugoslavio:** Danĉiko Nikolić, FD Beograd; Kasim Hadžić, FD Sarajevo. **Norvegujo:** Per Johan Krogstie, FD Løten. **Svedujo:** Franko kaj s-ino Ulla Luin, D kaj FD Tyresö. **Tunizio:** s-ino Marie-Thérèse Lloancy, D Le Bardo (Tunis). **Usono:** s-ino Sally L. Hopkins, FD San Antonio.

DONACOJ 1973 (Gld.)

Fondaĵo Canuto: Nederlando: J.L. Muller, 10,—; Svedujo: S. Möllestad, 6,20. Sumo ĝisnuna: 2 662, 55. **Ĝenerala kaso:** Anonime: 0,92. FR Germanujo: s-ino M. Vogel, 8,07. Nederlando: Th.M. Janssen, 35,—. Svislando: R. Sauter, 1,63; N. Weiss, 0,82. Sumo ĝisnuna: 1 240, 61.

Patrona membro A de TEJO 1974: 2. H.J. Lewis, Kanado.


Propaganda konto: Nederlando: G.N.M. van Dijk, 25,—. Usono: R.A. Lewin, 82,92. Sumo ĝisnuna: 2 390, 24.

TEJO: Aŭstralio: s-ino Z. Einihovici, 38,—. Sumo ĝisnuna: 513,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo. Universala Esperanto-Asocio

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas sole nur la anoncantoj.



Tutmonde korespondi deziras: 17-jara St. Gurkīnys, Palsodès kaimas, Saldutiškio, Utenos raj., Litovio, Sovetunio.

Amuzaj Dialogoj en Esperanto estas la titolo de nova kaj plaĉe prezentita legolibro por ridemaj lernantoj kaj instruantoj. Ĝi enhavas 2000 konversaciajn frazojn, parolturnojn, didaktikajn demandojn kaj respondojn, kaj 20 tutpaĝajn humurajn ilustraĵojn. Prezo: 4,50 guldenoj (por Nederlando: 4,68 gld.); sendo-kostoj: 10%. Mendu ĉe via-landa libro-servo aŭ rekte ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64. **Fondumo Esperanto**, Esperantotie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando, vendas librojn Trompeter 151 paĝoj. Verkoj de Heine en Esperanto 317 paĝoj.

Sinjorino Raymond Schwartz, ne povante respondi aparte al la tre multaj personoj, kiuj esprimis al ŝi siajn kondolencojn pro la morto de ŝia edzo, petas ilin trovi ĉi tie ŝiajn tre kortuŝitajn dankojn.

Instruistinoj serĉas leterkontakton kun gekolegoj. Skribu al: S-ino E. Formaggio, Via Privata S. Rufino 32, I-16043 Chiavari, Italujo.

Viljanda Esperanto-Klubo okazigos letervesperon 1974-01-25. Bonvolu sendi amase salutkartojn kaj leterojn. Respondo garantiita. Samtempe korespondi deziras gejunuloj (12-30-jaraĝaj) kaj pliaĝuloj. Esperanto-Klubo, pk 33, 202900 Viljandi, Estonio, Sovet-Unio.

Universala Invalida Esperanto-Asocio, Box 5, Strib, DK-5500 Middelfart, Danlando, deziras kontakti ĉiujn invalidojn kaj kriplulojn de la tuta mondo. Skribu por nia bulteno.

Laborloko perata por esperantisto-laboristo. Kontaktu al Fondumo Esperanto, Esperantotie 4, SF-02220 Iirislahti, Finnlando.

Opola E-klubo organizos letervesperon, januaro '74. Skribu amase. Respondon al ĉiuj. PL 45-777 Opole, ul. Zwycęstwa 2-4 m 91, Pollando.

Deziras aĉeti, interŝanĝi nudfotojn kun foto-amatoroj Leif Heilberg, P.O. Box 22159, San Francisco, Ca 94122, Usono.

Se vi havas vendeblajn ekz. de Esp. revuoj kaj libroj, bv. skribi al s-ro Ramon Molera — str. Sta. Joaquina, 13 — Moyá (Barcelona) — Hispanujo.

La tornistro (por instruoj kaj por distro) No. 1. Literatura jarkajero ilustrita. Varia enhavo: artikoloj, poemoj, spritaĵoj, recenzoj, rakontoj, ktp. 52p. 22cm. Prezo: 5 gld. Mendu ĉe UEA; aŭ kontraŭ 5 gld., egalvaloro aŭ 10 internaciaj respondkuponoj, ĉe Argentina Esperanto-Instituto, C.C. 58, Suc. 12, Buenos Aires, Argentino.

Ni serĉas esperantistojn, kiuj ankaŭ suferas je la haŭt-malsano psorazio. The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, Britujo. Represo petata.

INDEKSO

66a jaro 1973

Adverbo 8
Aeronaŭtiko 32
Afriko 50, 121
AIDMLK 13, 76
Akademio de Esperanto 62
Albanujo 121
Al-Amily 29, 174
Ameriko 111 (nomoj), 121
Anev 33
Apliko de Esperanto 111
Argentino 13, 76
Assimil 183
Aŭstrujo 32, 135, 175
Aviado 51, 92
Bagdad 29
BEA 67
Belgujo 11, 32, 43, 50, 125, 196
Belsoneco de Esperanto (pruvo) 114
Bengalujo 196, 211
Beograd 44-45
Bjalistoko 111
Bormann 69
Brazilo 65, 66, 175, 196, 205
Britujo 50, 62, 69, 94, 112
Bulgarujo 50, 94
CED 41, 48, 121, 184-185
Ciccanti 122, 197
Ĉeĥoslovakujo 50, 204
Ĉinujo 32
Dade 122
Danlando 93, 112, 117
Deklaracio pri Homaj Rajtoj 62
Delegitservo 187
Denaskaj esperantistoj 86-88
Depresaĵoj 73
De Smet 113
Devoj de esperantisto 58, 77
Diskoj 71 (vidu ankaŭ ĉe recenzoj kaj Eldonaĵoj)
Disko-kurso 54
Dulingvismo en Usono 122-123
Echtner 197
Edukado 82, 86-88, 89
EEK 46, 125, 166
Egalrajteco, Lingva 41
EK 46, 83, 205
Ekspozicioj 122, 174, 211
Ekzameno Internacia 49
Ekzameno Pedagogia 23
Eldona aktiveco 101
Eldonaĵoj nerecenzitaj 7, 35, 54, 72, 91, 110, 128, 172, 195, 210

Elekto de komitatanoj B 199
Enciklopedio de Esperanto 8, 170, 194
Esperanto en Radio 17, 37, 78, 95, 119, 137, 178, 198.
Esperanto-instruado 197, 121
Eŭropo 32, 69, 175, 211
Federismo 32
Fervojoj 70
Filatelo 14, 42, 51
Filioj de UEA 187
Finnlando 30-31, 32
Fotografio 32
Francujo 11, 14, 69, 102
Gastlaboristoj 212
Gazetaro 188, 212, 213
Germana D.R. 50, 134, 196
Germanujo F.R. 93, 94, 135, 175
Ĝuĝev 69
Haazen 174, 196
Hamburgo 130-131, 181
Havajo 63
Heck 28
Helpo al komencantoj 121, 187
Heredaĵoj 216
Hindujo 121
Hispanujo 112, 134
Hoekstra 113
Homaj Rajtoj 62
"Homo kaj Kosmo" 213
Hungarujo 50, 175, 196
ILEI 9, 23
Infankongreseto 88, 167
Infanoj 86-88, 89, 90
Informado 30-31, 67, 73, 84-85, 125
Informejo (vidu: Vi demandas ni respondas)
Institucio Hodler 102
Instruistoj 9
Interflora 5
Interlingvistiko 132-133
Internacia Aer-Transporta Asocio 92
Internacia E-Instituto 173
Internaciaj organizaĵoj 1
Internacia seminario de GEJ 56
Irako 121
Isaev 26
Israelo 69, 76, 112, 175
Italujo 14, 50, 69, 205, 211
Japanujo 13
Jemeno 24

Jugoslavio 95
Jung 14
Junularo 13, 36-37, 57, 106-107, 117 (vidu ankaŭ: TEJO)
Kalendaro 40, 98-99, 138, 213
Kalocsay 134
Kanado 112
Kanarioj 3
Kaŭakami 50, 51, 134, 197
Klubo 31
Komenco bona - ĉio bona 16, 38, 58, 77, 96, 115, 136, 176, 193, 215
Komerco 51
Komuna merkato 2, 35
Konferencoj 9, 26-27
Konfidenco de la estraraj kunsidoj 101
Kongresoj: UK 57a, Portland 23
UK 58a, Beograd 12, 41, 55, 74-75, 95, 116, 141-159, 168-169, 188
UK 59a, Hamburg 177, 186, 214
Postkongreso, Ateno 75, 167
IJK 29a, Sarajevo 12, 36, 56, 76, 117, 164-165
Kongresoj aliaj 47 (Eŭropa), 122, 166, 182 (SAT)
Konkursoj:
Belartaj 156, 186, 206, 207
Oratora 106-107, 156
Koresponda servo 97, 98, 117
Koreujo 50, 69, 117, 134, 211
Kotizoj 101, 178-179, 216
Kubo 23, 66, 121
Kursoj 103 (vidu ankaŭ SUK)
Kuvajto 93

Laborplano (vidu Tria Baza Laborplano)
Lapenna I. 183
Laponoj 104-105
Latina Ameriko 64
Latvujo 14
Lebrun 33
Lerneja Bulteno 9, 94-95
Lernejoj 22, 63, 94-95, 125, 174
Lernolibroj 21, 121
Leteroj de legantoj 35, 73, 111, 125, 187
Libroj 21, 88, 114
Lingva problemo 3, 35, 41, 43, 46, 62, 63, 82, 83, 103, 122-123,

161-163, 201, 204, 216
 Lingvistiko 26, 212
 Lingvo-instruado 82 (vidu ankaŭ E-instruado kaj Seminario Nederland-Germana)
 Lingvoj 26-27
 la franca 42, 114
 Literaturo 15, 115, 206
 Llech-Walter 33
 Loke-Fake-Persone 14, 32-33, 50-51, 69-70, 92-93, 112-113, 134, 174-175, 196-197, 211-213
 "Los Angeles Times" 122
 Lukács 73
 Luksemburgo 122
 Lukto de la nederlandanoj kontraŭ la maro, La 193

 Madagaskaro 14, 121
 Magnetofona servo 19, 98, 207-208
 Malagasa Respubliko 196
 Manifestacioj 125
 Maristaj terminaroj 35
 Matematiko 197
 Maŭra 194
 Medicinistoj 123
 MEM 126
 Membroj-subtenantoj 199-200
 "Miami News" 123
 Miĥalski 170
 Minacataj lingvoj kaj kulturoj 13
 Minami 70
 Miss Esperanto 122
 "Monda Lingvo-Problemo, La" 41, 61, 121
 Movado 28, 176
 Muziko 32, 197
 Navigacio 32
 Nederlando 135
 Neergaaard 33, 197
 Nekrologoj 11, 28, 93, 114, 126, 173, 187, 213
 Nomoj de popoloj kaj landoj 8
 Norvegujo 31
 Nov-Zelando 135
 Oficiala informilo 19, 39, 79, 98-99, 138, 159-160, 179-180, 199, 216
 Opinio-sondo en Francujo 102, 182
 Parlamento 2, 42, 81
 Participoj 96
 Pedagogio 113
 Pentrarto 32, 51
 Peruo 175
 Politiko 92, 113
 Pollando 95, 175
 Popolaj diraĵoj el Bagdad 29
 Popović 118
 Pupteatro 57, 113
 Portugalujo 103, 196
 Poŝtmarkkolektado 33
 Propaganda konto 121
 PTT 79, 123, 212
 RABO-bank 114
 Radio, 18, 43, 48, 134, 197, 212 (vidu ankaŭ: Esperanto en radio)

Radio Zagreb (jubileo) 43
 Recenzoj (kondiĉoj) 70
 Recenzoj:
 ABZ de amo 53
 Analiza historio de E-movado 109
 Compendio de Esperanto para adelantados 7
 Curso completo 52
 Doktoro Rosales 208
 Dokumentoj el Romo 171
 Drole kaj Petole 170
 El propra kaj fremda 110
 Enkonduko en la komputera lingvistikon 109
 Esperanto language as a literary medium, The 52
 Esperanto-lingva muzika leksikono 109
 Farmakologio por malbonuzoj de medikamentoj 91
 First course in Esperanto, A 6
 Ĝenerala kaj homa histologio 34
 Home Study Course in Basic Esperanto 54
 "Juna amiko" 10, 34
 "Junulo" 117
 Kantanta mia bird' 127
 Kit vivas 71
 Kun sopira koro 110
 Mahatmo Gandhi 126
 Margaret Hill kantas britajn popol-kantojn 109
 Mr Tot aĉetas mil okulojn 171
 Nederlanda bibliografio 72
 Ne plu ludu 110
 Okupacio 91
 Orienta renesanco 71
 Paperoj de d-ro Ante Ramljak, La 209
 Popido: la verda dialekto 210
 Printempo en la aŭtuno 52
 Saltego trans jarmiloj 209
 Savo el la neĝo 171
 Sklavoj de Dio 210
 Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto 7
 Tuta Esperanto, La 128
 Torento 52
 Unuaj libroj por esperantistoj 195
 Verda raketo 209
 Verkoj de H. Heine en Esperanto 195
 Voĉoj de prof. d-ro K. Kalocsay, La 194
 William Auld legas poezion 71
 Winnie-La-Pu 6

 Religio 14, 33
 Rezolucioj 10 (ILEI), 141 (Kongresa), 163 (Slovena), 166 (Luksemburga)
 Rotario 174
 Rumanujo 50
 Sadler 119
 San Marino 122

Sarajevo 37
 SAT 182
 Satoo 51
 Schmidt 33
 Schwartz 104-105, 115
 Scienco 14
 Semajno de Internacia Amikeco 25, 203
 Senegalo 14
 Sennaciismo 51
 Setälä 93, 134
 Simbolo kaj vorto 8
 Skoltoj 57, 92, 103
 Socialdemokratoj kaj Esperanto 204
 Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio
 Sociologio 1
 Soveta Unio 14, 26, 32, 76, 112, 175, 196
 Sporto 51, 174, 197, 212
 Starke 174
 STELo 97
 Studentoj 173 (vidu ankaŭ STELo)
 Suda Vjetnamujo 97, 121
 Sufikso -er- 58
 SUK (Someraj Universitataj Kursoj) 72
 Sygnarski 213
 Svedujo 70, 211
 Svislando 51, 76, 132-133, 197
 Szerdahelyi 213

 Teatro 113, 151, 197
 Telefono 85
 TEJO 13, 65, 97, 135, 158, 198
 Televido 64, 65, 76, 82, 212
 Tendumado 70, 92
 Terminologio 197
 TK-eldonejo 118
 Traduko 14
 Tria Baza Laborplano de UEA, La diskuto 28, 46-47, 81, 124-125 teksto 189-192
 Transpaga problemo 21, 121
 Turismo 4, 14, 117, 174, 212
 Turku: festotago 4
 Turkujo 121
 Tyblewski 113
 UEA 84, 101, 121, 201-203
 UN 22, 25, 43, 82, 103
 "Unesco Features" 6
 "Unesco Informatie" 125
 Universitatoj 22, 43, 103
 Unuiĝo de Internaciaj Asocioj 43
 Urugvuajo 65
 Usono 51, 69, 122-123, 198
 "Uzantoj" kaj "agantoj" 81
 Vi demandas - ni respondas 73, 114
 Vortordo en Esperanto 38
 Vortaroj 114
 Walla Walla 67-68
 White 24
 Woessink-Nagata 119
 Wood 27
 Zairo 121
 Zamenhof-domo 37

NOVA! Sinjorinoj, ne plu hezitu!
En Rotterdam malfermiĝis la plej granda
nederlanda peltvendejo: La Peltopalaco.
Kiel malferma reklamo por ĉiuj

PELTMANTELOJ

kaj

PELTĈAPELOJ

20% rabato. Skriba garantio. Laŭdezire
tre flekseblaj kreditkondiĉoj. Vojaĝ-
koston por du personoj en Nederlando
ni kompensas ĉe aĉeto. Het Bontpaleis,
“Onder de Laurenstoren”, Hoogstraat
153, Rotterdam-C, tel. (010) 14 33 37.
Vendrede aĉetvespero.

La Monda Lingvo-Problemo

Socia—Lingvistika—Politika—Jura
Psiĥologia—Ekonomika

Vol. 5 (1973) N-ro 13: Enhavo

Stephen OREN, Linguistic nationalism and sectarian
advantage: Strategies in the reorganization of
Mysore and Punjab States, India

Werner BORMANN, Die Position der deutschen
Sprache

David K. JORDAN, Language choice and interethnic
relations in Taiwan

W.M.A. De SMET, Terminologie et nomenclature
biologiques

Rubrikoj: Notoj, Novaj Libroj

Plus ampleksaj resumoj en Esperanto

Eldono de Mouton sub aŭspicio de CED

Mendu per UEA

Jarabono (3 x 64 p.) kostas 30,— gld.; unuopa
numero 12,— gld. (por Nederlando respektive
31,20 kaj 12,48 gld.).

Ankoraŭ haveblaj: vol. 1 (1969), n-roj 1-3; vol. 2
(1970), n-roj 4-6; vol. 3 (1971), n-roj 7-9; vol. 4
(1972), n-roj 10-12.

Nun aperanta: volumo 5 (1973), n-roj 13-15.

Jam akceptataj estas la abonoj ankaŭ por vol. 6
(1974), n-roj 16-18, kaj por la postaj volumoj.

Abonu al la fondita en 1964

BIBLIA REVUO

Trimonata internacia gazeto pri Bibliaj kaj Orientaj
Studoj

(ordinara jarabono: 6 usonaj dolaroj)

Petu senpagan ekzempleron kaj diskonigu ĝin.

Varbu membrojn al la fondita en 1967

I. A. B. O.

“Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj”
faka kunlaboranta asocio de UEA


(aliĝo simpla 2 usonaj dolaroj; ordinara 6; subten-
anta 50; dumviva 300)

Donu vian apogon al la fondita en 1968

EKUMENA BIBLIO-FONDAĴO

por ebligi la eldonon de komuna traduko en Esper-
anto de la Sanktaj Skriboj

Sendu viajn abonprezojn, kotizojn kaj donacojn al
Administracio de Biblia Revuo (Pĉk. 8/17852),
Piazza Duomo 4, I 48100 Ravenna (Italujo)



Jen la
solvo
de la
problemo

kiel teni en bona ordo viajn ekzemplerojn de
“Esperanto”. Tiu ĉi bela, mane farita bindilo
permesas al vi aldoni en nuraj sekundoj ĉiun
novan numeron de la revuo tuj post ĝia apero.
Jam de la unuaj numeroj vi do havas pretan
kolekton. Simpla sed efika sistemo certigas, ke
la paĝoj kuŝas ebenaj por facila legado ĝis la
meza rando. Prezo: 7,20 (por Nederlando 8,35)
gld. plus sendokostoj 10%.

Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg
176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Bona ideo . . . por viaj peltaĵoj
ĉiukaze rigardi en la plej granda kaj plej
malmultekosta peltvendejo de Nederlando.
Miloj da mallongaj kaj longaj

PELTMANTELOJ

peltaj ĉapeloj kaj kolumoj kontraŭ allogaj,
malaltaj, pageblaj prezoj!
Aĉeti peltaĵon baziĝas sur fido. Trijara garanti-
atesto indas tiun fidon. Pli da garantio por pelto.
Laŭdezire tre flekseblaj kreditkondiĉoj.

DE BONTKONING, Hoogstraat 97,
Rotterdam-C, tel. (010) 117.117. Granda aŭto-
parkejo antaŭ la magazeno.

Ĉe aĉeto por du personoj: repago de kostoj de
vojaĝo en Nederlando per aŭtobuso, vagonaro
aŭ propra aŭto. Do vojaĝo senpaga.

Vendredvespere malfermita ĝis la 21.00 h.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonantojn de 1974

Abonprezo:

1 jaro 6, – gld.

2 jaroj 9, – gld.

3 jaroj 12, – gld.


(Por Nederlando aldoniĝas
enlanda imposto 4%.)

Abonu ĉe:

Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando;
poŝta ĝirkonto: 37 89 64.

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino Ĉi

Specimeno akirebla senpage



La lasta manuskripto de d-ro Zamenhof

H.C. ANDERSEN

FABELOJ

(IV-a volumo)

Tradukis d-ro L.L. Zamenhof

*53 originalaj desegnaĵoj de
A. Uniechowski*

244 paĝoj

Prezo: 150 b.fr. aŭ egalvaloro

(Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon
en valoro de 0,30 us. dol. por aĉeto de
"Fabeloj, vol. I".)

Eldonis: Heroldo de Esperanto

13 rue de la Reinette (Pippelingstr.),
B 1000 Bruselo.

Mendu ĉe la eldoninto aŭ ĉe UEA

**Plia sesio de la SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ
en la SART-TILMAN-KVARTALO
de la UNIVERSITATO DE LIEĜO (BELGIO)**

PROGRAMO

BIOLOGIO

04. – 11. 08. 1974

C. Støp-Bowitz (Norvegio) : Enkonduko en ĝeneralan biologion
C. Støp-Bowitz (Norvegio) : Elementa ekologio
R. Lewin (Usono) : Enkonduka kurso pri algoj

11. – 18. 08. 1974

C. Støp-Bowitz (Norvegio) : Segmentumitaj animalaj grupoj
R. Lewin (Usono) : Utilaj kaj malbonfaraj algoj

18. – 25. 08. 1974

E. Balech (Argentino) : Planktono kaj mara produktado
H. Oka (Japanio) : Senseksa reproduktado de animaloj

KEMIO

04. – 11. 08. 1974

S. Kawamura (Japanio) : Fundamentaj konceptoj en kemio
S. Kawamura (Japanio) : Informado kaj dokumentado pri kemio

11. – 18. 08. 1974

S. Kawamura (Japanio) : Enkonduko en organikan kaj biologian kemion
B. Cavanagh (Grandbritio) : Elektrolitoj – teorio kaj ties aplikado

18. – 25. 08. 1974

S. Kawamura (Japanio) : Novaj manĝaĵoj (artefarita bovaĵo el sojoj, mikroorganismoj el petrolo k.a.)
M. Flint (Grandbritio) : Porfirinoj – biokemio de vivnecesaj pigmentoj, ĉefe tiu de la ruĝa ĉelo de la sango

SOCILINGVISTIKO

04. – 11. 08. 1974

E. Brent (Kanado) : Varilingvistikaj esploroj

11. – 18. 08. 1974

E. Brent (Kanado) : Elementoj de Esperanta socilingvistiko

Ĉiu kurso enhavos minimume 8 lekciojn de po 45 minutoj; okazos ankaŭ kursakompanaj seminarioj, praktikaj ekzercoj kaj studvizitoj. La kromprogramo konsistos el perfektiga Esperanto-kurso, ekskursoj, sportado, filmvesperoj ktp. La ĉi-supra programo estas provizora en tiu senco ke povos aldoniĝi pliaj kursoj.

Haveblaj STIPENDIOJ

1. Instituto Hodler 68 (7 000 bf)
2. Instituto Hodler 68 (7 000 bf)
3. Belga Esperanto-Federacio (5 000 bf)
4. F-ino G. Wolff (5 000 bf)
5. Heroldo de Esperanto (5 000 bf)
6. S. Kawamura (4 000 bf)
7. Germana Esperanto-Asocio (5 000 bf)

Petu pliajn informojn ĉe

**SOMERAJ
UNIVERSITATAJ
KURSOJ**

Boîte Postale 9
B-4000 LIEGE 3
(Belgio)

KOTIZOJ

Parto- preno dum semajnoj	Kategorio A		Kategorio B	
	Kotizo (belgaj fr)	Deviga antaŭpago	Kotizo (bf)	Deviga antaŭpago
3	5 000,—	1 300,—	8 000,—	2 000,—
2	4 000,—	1 000,—	6 000,—	1 500,—
1	2 400,—	600,—	3 500,—	900,—

Kategorio A: studento aŭ persono fininta siajn studojn antaŭ ne pli ol unu jaro; maksimuma aĝo: 30 jaroj.

Kategorio B: aliaj personoj.

La kotizo inkluzivas la program- kaj la restad-kostojn.

Kromprogrameroj (ekz. perfektiga esperanto-kurso, ekskursoj, ktp.) estas aparte pagendaj.

Semajna kotizo de la perfektiga esperanto-kurso: 300,— bf.

Aligilo validas, se ĝin akompanas atestilo (kun esperantlingva traduko) pri abiturienteco aŭ sam-nivela klereco, oficiala konfirmo (kun esperantlingva traduko) pri eventuala aparteno al kategorio A kaj la deviga, principe ne repagebla antaŭpago (ĝirenda al la poŝtgirkonto 1850. 91 Belgio). La SUK-estraro tamen rezervas al si la rajton rifuzi aligon, ekz. konsiderante la altan nivelon de la kursoj. Kaze de rifuzo la antaŭpago estos redonita.

S

U

K

74

04. – 25. 08. 1974

